But the difficulty is not insurmountable. As Esperanto grows in popularity it will become more and more usual to find the finest works of every nation in an Esperanto dress, translated by a compatriot of the original writer. Through such translations the student of every country will be able to get in touch with the spirit of the original in an incomparably greater degree than by attempting to wrest the meaning from the original with a half-knowledge of the foreign language.

From *The Sheffield Weekly News*.



CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note Address : 17, Hart-street, London, W.C.

Novaj Grupoj.—En ĉi tiu numero ni havas la plezuron kore bonvenigi en nian Asocion da Grupojn en la lokoj BEXLEY HEATH, Kent, kaj PAIGNTON, Devon. Ili floru kaj energie propagandu nian ideon !

LONDON.

Esperanto Services in North London.—The next Esperanto Service in North London will be held on Sunday, February 14, at 3.15, in *Harcourt Church, St. Paul's-road, Canonbury, N.*, when the speaker will be Mr. E. K. Jayne, and the soloist Miss Nesta G. Price.

Owing to heavy rain (which has fallen on eleven of the last twelve occasions), the attendance has several times recently fallen below fifty, which is a number surely unworthy of the large body of Esperantists in London. I have complained of the weather to the Church authorities, who will doubtless do better next time, when I hope there will be a record attendance.—M.C.B.

Tufnell.—Twelve months ago two or three pupils of S-ro M. C. Butler, with a zeal worthy of the cause,

" Tamen, kiel malproksime de tiu kono staras la plimulto de angloj en la nunaj tempoj, kaj kiel indiferentaj ili estas por ĝia atingo ! Germanujo posedas skolon de poezio el la plej grandaj kaj plej profundaj ; tamen kiom da angloj posedas la sekretion de ĝiaj altajoj, aŭ la eniron al ĝiaj entemplaj mirindajoj ? . . . Se nur kiel senegalaj okazon por studi la animon de popolo, kial devas la angloj malatenti tiun ĉi literaturon ? "

" Mi ne deziras tro insisti pri tiu punkto, tamen estas malfacile silenti pri certaj plej frapantaj montroj de nia indiferenteco, eĉ en la universitatoj, pri la germana historio, ankaŭ do pri la germana politiko. Eĉ ne unu paĝon oni tradukis el la plej grava verko de Treitschke ; tamen lia historio pri la unuaj paŝoj en la granda luktado de Prusujo por la supereco, liaj literaturaj disertacioj kaj liaj lekcioj pri la politika teorio instigas pli varman scivolon en Germanujo, ol faris en mez-Victoria Anglujo la disertacioj kaj la historio de Macaulay."

LA TASKO DE ESPERANTO.

Tiel Profesoro Cramb akcentas la bezonon de studado al la efektiva pensmaniero de ĉiu popolo. Tamen, ĉu vere la angloj estas kulpaj pro sia nescio de la germana lingvo ? Kiel ni jam alioke rimarkigis, eĉ kun intenco la plej bona en la mondo, lerni alilandajn lingvojn en ia urbo enlanda, estas afero ekstreme malfacila. Se oni estas kontenta konsistigi la laboron de sia vivo el la lernado de lingvoj : tiel estu. Sed se oni klopodadas pri aliaj aferoj, tiam por la plej granda plimulto la rezultato ĉiam estos, kiel ĝi jam ĉiam estis : io celita, io nur duone farita. Kaj se oni lernas la germanan nur duone, tiu neniam posedos tiun kapablon por profundigi sub la supraj, pri kiu pensis Profesoro Cramb, kiam li parolis kiel ĉi-supre.

Sed la malfacilo neniel estas io nesuperebla. Laŭ kiom Esperanto pli kaj pli populariĝos, laŭ tiom oni kutimiĝos trovi la plej belajn verkojn de ĉiuj nacioj Esperante vestitajn, nome per traduko farita de samnaciano de la originala verkinto. Per tiaj tradukoj la studantoj en ĉiuj landoj povos senkompare pli ĝuste rilatiĝi kun la spirito de la originalo, ol per la penado eldevigi el la originalo ĝian pensaron per helpo de nura duon-koniĝo kun la alilanda lingvo.

Tradukis A.E.W.

determined to form an Esperantist Group in Kentish Town. A big effort succeeded in netting ten members (most of whom were new beginners), who arranged to meet together at the house of one of the number for tuition and practice. The enthusiasm spread and the quarters became cramped. A new home was found at the New Church, Camden-road, and the group was transferred thereto, Colonel Pollen, Mr. H. Bolingbroke Mudie, and numbers of other friends being present at the opening ceremony. The group, which has just celebrated its first "birthday," must be complimented on the work it has done during its first year. Its membership has increased to forty, many of whom are now preparing for the B.E.A. examination. With the aid of other groups in N. London, open-air propaganda meetings were held throughout the summer on Parliament Hill Fields and in Finsbury Park, which were very successful, being for the most part well supported by local Esperantists and attended by large numbers of the outside public.

The new secretary (S-ro S. H. Taylor) is confident of making the present year a still greater success, and the enthusiasm of the members shows that he will have an excellent backing.—L.S.

The National Lending Library for the Blind, Queen's-road, W., have just accepted a copy of Bernard Long's *The Passing of Babel*, put into Braille by S-ro Phillipmore. Blind Esperantists now have a good opportunity for propagating Esperanto among their fellow-sufferers who are not yet *sameideanoj*.

Bexley Heath.—La Bekslihita Esperanta Grupo jam de la novjartago ekzistas! Kiel anoncite en la Januara eldono de THE BRITISH ESPERANTIST, nia unua kunveno okazis la 29an de Decembro. Dudek kvar knaboj ĉeestis, kaj la grupstarigonto, S-ro A. V. Thomson, parolis ĉirkaŭ tri duonhorojn pri Esperanto kaj la deveno de la ideo, fondi grupon en Bekslihito. Post formalo propono tiel celanta, kiu estis unuanime konsentata, oni kompilis registron de 21 nomoj. Ok membroj farigis komitato; ĉiu el ili prizorgonte unu fakon de la grupaj aferoj. Krom la suprenomito, kiu estas la *Prezidento*, ili estas: *Prezidanto*, S-ro G. F. G. Turner; *Sekretario*, S-ro J. R. Brown (76, Oaklands-road); *Kasisto*, S-ro H. S. Wakerell; *Protokolisto*, S-ro H. W. Clayton; *Bibliotekisto*, S-ro R. K. Berry; *Varbisto*, S-ro A. J. Cole; kaj *Cambrozorganto*, S-ro E. H. C. Robinson. Je la vespero de la 1a de Januaro, la tago de nia filiigo al la B.E.A., vizitis nian humilan grupejon Doktoro John Pollen, kiu alparolis kun sia konata afableco ĉirkaŭ dekduon el la grupanoj pri Esperantaj aferoj. Oni komprenos sen plua priskribo, ke ni pasigis tre plaĉan duhoron. Ni nun havas 26 grupanojn, kaj dank' al la malavareco de unu-du amikoj, finance ni fartas bone. Ni sukcessis ankaŭ iom propagandi nian lingvon inter la belgoj rifugintaj en Bekslihito.

Birkenhead.—The opening meeting of the session took place on January 14, and was kept as a social evening. The secretary introduced to those present a visitor from over the sea, Signor Johano Conceiro, chief steward of the s.s. *Competitor*, at Liverpool, from Savannah. About a month ago he wrote to the secretary from Savannah advising his arrival in the Mersey port, and announcing his intention to visit the Birkenhead group, explaining that in his travels over the world he made it a point wherever he visited to look up Esperantists, and always found a warm welcome; he called himself "Agent on the sea for Esperanto." In fluent Esperanto he described his travels in all parts of the world, Europe, the Americas, China, Japan, etc. He confirmed a statement often made that Esperantists when using the coming international language are truly international, *i.e.*, their nationality cannot be detected from their speech. Even in Japan and China the national accent seemed to be lost, and he conversed easily with both races.

Southport.—There was a large attendance of members at the Society's rooms, 561, Lord-street, on January 4. A soldiers' sing-song was to have been held, but this was changed in consideration of the loss which the society had sustained in the unexpected death of their energetic secretary, Mrs. Percy Rosling, which occurred on December 29. The Rev. J. Ashby, Miss Iddon, and others having made sympathetic reference to the event, Mrs. Pierpoint of Ainsdale was elected to the vacant position of secretary. On January 14 Mr. Percy Foster gave an interesting account of his "honeymoon" tour on the Continent, just at the time when the war was breaking out.

Edinburgh.—Our group meeting, on January 16, was entirely devoted to readings, songs, and recitations from the works of D-ro Zamenhof, and was a great success. A collection taken during the evening on

behalf of the Esperanto Red Cross Ambulance Fund realised over £7. To this amount has since been added £3 5s., the proceeds of a Whist Drive organised by Mr. and Mrs. Senior, and held at their home.

At our *Diservo* on the 20th Mr. Harvey was the preacher. With the service in January we begin our fourth year of such *Diservoj*, which continue to be much appreciated and well attended.

Miss Tait, who spoke on "Men, Women, and Affairs in General," gave us, on January 6, a very racy and amusing paper.

On the 13 Mr. Cameron, in a very informative way, put before us the *pros and cons* with regard to "The Actor's Profession as a Career." A very *bonstila* first essay.

On January 14, under the auspices of the Senior Literary Society of St. Matthew's Parish Church, our president, Mr. Wm. Page, and Mr. Wm. Harvey gave propaganda addresses on "Esperanto," and sang in the language. At the close of the meeting several members gave in their names for the formation of a class, and it was intimated that any others wishing to join might so inform Miss Handyside, 41 *Bruntfield-gardens*.

Glasgow.—The society here steadily pursue their efforts for the extension of the knowledge of Esperanto, and on January 18, in their meeting place at the Royal Philosophical Society Rooms, Bath-street, the Rev. John E. M'Fadyen, D.D., Professor of Old Testament Literature in the U.F. Church College, is to give a public address. His subject is "How I was Converted to Esperanto."

S. Wales.—The Annual General Meeting of the Sud-Kimruja Ligo was held in Cardiff on January 2, when the following officers were re-elected:—President, Rev. W. H. Harris, B.A.; vice-presidents, Dr. D. Rhys-Jones (Cardiff) and Mr. Jack Edwards (Aberystwith); secretary, Mr. W. E. Davies-Treorchy.

The President gave a *résumé* of the Esperanto literature concerning the war, which he had received from Germany. On the proposition of Mr. R. T. Evans (Barry), it was decided to found a lending library in connection with the League, and Mr. Evans was asked to prepare a scheme for presentation at the next League meeting, which will be held at Merthyr in April.

After tea the meeting was continued, when Mr. F. S. Gammon gave an Esperanto lecture, illustrated with slides, on *La Doma Muño*, and Mr. S. M. Harris, B.A., read a paper tracing the history of universal languages. Others who assisted in the programme were Mrs. A. H. Jones, Miss Jones, Miss Hosking, and Messrs. Webb, Jones, Barlow, and Emms. The usual vote of thanks and the International Anthem terminated the meeting.

La B.E.N.A. kaj Esperanto.—Dum la lasta monato mi ricevis poštakton de la U.E.A. Delegito en Celebes, en kiu li esprimas deziron aliĝi al tiu ĉi Esperantista Naturista Societo. Nun la dua Rondiranto komencis sian vagadon (la 4an Januaro). Naŭ personoj ricevis la unuan (Decembran); dek ricevos la duan (Januaran); kaj verŝajne proksimume dek kvin ricevos la trian (Februaran). Mi pretigas cirkuleron por sendi al diversaj naturistoj kaj naturhistoriaj firmoj, kies nomoj troviĝas en la *Country Side*, kaj mi esperas tiel altiri novajn membrojn. La kotizajo estas nur unu ŝilingo jare. Novajn membrojn ĉiulandajn mi bezonegas. Skribu tuj por detaloj al ERIC BIDDLE, B.E.N.A. (Sekretario), "Selborne," *Western-road, Wylde-green, near Birmingham*.

* * * *

EDZIGO.

En Montrose (45, Ferry-street), la 30an de Decembro, S-ro A. B. Grieve, F.B.E.A., al F-ino Jessie Moir.

Gratulojn kaj korajn bondezirojn.

The British Esperanto Congress, 1915.

BATH, January, 1915.

At the Sheffield Congress last Whitsuntide it was resolved to hold the 1915 Congress at Bath. This decision was a cause of great satisfaction to Esperantists here, and we look forward with pleasure to the expected visit of our British samideanoj next Whitsuntide.

Present circumstances, however, have given rise to some doubts as to the advisability of holding the Congress at all this year.

In our opinion the Congress ought not to be abandoned.

If it is held, it will afford the members a much-needed opportunity for mutual counsel and encouragement, for a review of our progress and our prospects, and for discussing Esperantism in relation to the problems set up by the war. Its usefulness also as an occasion for propaganda, and as a means of educating the public as to our aims and methods, must not be overlooked.

These results, however, would be somewhat discounted if the Congress should prove unsuccessful as regards numbers. On the other hand, a large attendance would not only strengthen our own enthusiasm, but would convince outsiders of our unabated faith in the practical value of our ideals.

The Bath Society is ready and anxious to proceed with the necessary arrangements, provided there is a reasonable prospect of an attendance large enough to justify the holding of the Congress.

In order to ascertain how far we may rely on the support of the samideanaro, we are issuing this circular to the Groups and Societies affiliated to the B.E.A., and shall be greatly obliged if they will favour us with their views on the subject, together with an indication, as far as possible, of the number of members who would probably attend the Congress.

A reply as early as convenient will be esteemed.

For the Bath Esperanto Society,
E. R. BLACKETT,
Secretary.

15, Southgate-street, Bath.



Belegaj Esperantaj Objektoj el Ligno.

Kvar verkojn, ĉizajojn, kiuj nun estas montrataj en la Legocambro de la B.E.A., oni deziras vendi kaj samtempe helpi al la belgaj rifugintoj aŭ la "Esperanto Red Cross Ambulance Fund," jene :—

(1). *Esperanta Simbolo*, el kverko, grandeco 2' 6 $\frac{1}{2}$ " x 2' 6", prezo £50 (Sm. 500).

(2). *Kadro, stilo Ludoviko XVI.*, kun fotografaĵo de D-ro Zamenhof, el kverko, grandeco 2' 0 $\frac{1}{2}$ " x 1' 8 $\frac{1}{2}$ ", prezo £30 (Sm. 300).

(3). Murtableto, stilo Grinling Gibbons, el kverko, grandeco 1' 7" x 1' 4 $\frac{1}{2}$ " x 6 $\frac{1}{2}$ ", prezo £25 (Sm. 250).

(4). Enkadraĵo (panelo), stilo Renesanco Itala, grandeco 1' 7" x 1' 3", prezo £10 (Sm. 100).

Se ili estos vendataj, la verkinto faros la sekvantajn donacojn :—

(1). £10 al la "Esperanto Red Cross Ambulance Fund," "Belgaj Rifugintoj," aŭ al iu alia Asocio, kiun elektos la aĉetanto.

(2). £5
(3). £5
(4). £3

Tiu, kiuj helpas tuj, helpas duoble.

Sin turni al

JOZEF ALMOND,
Ce B.E.A.

Croix Rouge de Belgique.

(BELGIAN RED CROSS).

Anglo-Belgian Committee.

UNDER THE PATRONAGE OF H.M. THE QUEEN OF THE BELGIANS.

SAVOY HOTEL (temporarily),
LONDON,

January 14, 1915.

DEAR SIRS,

In the name of the "Belgian Red Cross," of which we are the only officially authorised representatives in England, we thank you most heartily for the magnificent Motor Ambulance you presented us with.

You may feel quite sure that same will be of the greatest help and need to the Belgian Red Cross, and your esteemed association will always be entitled to our entire gratitude.

Believe us, dear Sirs,

Yours very faithfully,

Executive Committee.

BARON C. GOFFINET,

President.

LOUIS LAZARD,

Hon. Secretary.

Messrs. The President and Members of the British Esperanto Association, Hart-street, London, W.C.



La Aktora Grupo kaj Festorganizontoj.

En la Junia numero de *Belga Esperantisto* aperis la jena artikolo, kiu sendube interesos la organizontojn de naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj festoj :—

" BELGA KRONIKO.

" Kun granda ĝojo mi salutas la jusan fondigon de l' ANTVERPENA GEAKTORA GRUPO, kies prezidanto kaj regisoro estas S-ro J. De Waegemaere (la aklamita Jean-Baptiste de Bietje), kaj kies sekretario estas S-ro A. Vandevelde (la Reĝo de *Devo de Reĝo*, kaj de *Ginevra*, la Semanto de la *Revuo de la Sepa*, Trielo de *Hejma Paco*, Nonne de Bietje). Ambaŭ nomitaj estroj de l' nova grupo estas anoj de l' Antverpena Grupo Esperantista; ambaŭ metis ĉiam sian talenton tute sindone je la dispono de la Esperantistaj kongresoj; ambaŭ ankaŭ sin prezentos ĉe la proksima ekzameno pri profesora kapableco.

" Por la 'debuts' de l' grupo, oni anoncas prezentadon en Antverpen, kaj brilan teatran feston en iu granda eksterlanda urbo. *Jam de nun miaj geaktoroj sin metas je la dispono de Esperantaj societoj, belgaj aŭ nebelgaj.* Ni deziras kaj eĉ antaŭdiras al la Antverpena Geaktora Grupo grandan, tre grandan sukceson. Por ĉiuj sciigoj oni sin turnu *scribe* al S-ro A. Vandevelde, Willem Linnigstraat 17, Antwerpen.

" D-RO W. VAN DER BIEST."

La anoj de tiu ĉi grupo estas la famaj geaktoraj flandraj; kiuj kreis KAATJE, en Antverpeno kaj GINEVRA en Berne, dum la 7a kaj 9a internaciaj kongresoj. Pro la nuna milito, la anoncita 'debuts' de la grupo ne jam povis okazi, kaj sendube la anoj pro la bombardado de Antverpeno estas ĉiuj distritaj parte en Holando kaj parte en Anglujo.

Car la devizo de ĉiuj veraj Esperantistoj estas "In time of War, prepare for Peace," ĝi estas ankaŭ la devizo de la Geaktora Grupo, kies membroj studas, dum sia malgaja ekzilo, repertuaron de la pli famaj teatraj tradukitaj el ĉiuj lingvo.

Por ĉiuj sciigoj oni bonvole skribu al la Sekretario de tiu grupo, S-ro A. Vandevelde, nuna adreso 41, Wynn-dale-road, South Woodford, Essex, kiu ankaŭ akceptos de ĉiuj verkistoj por ekzamenado ĉu originalajn ĉu tradukitajn teatraj.

—A.V.

Redakcia Korespondado.

BELGAJ SAMIDEANOJ.

F-ino Jenny Fielding el Huddersfield skribas :—
“ Ĉi kune troviĝas eltiraĵoj el la letero, kiujn mi ricevis de du Namur'aj Esperantistoj.

“ Kelkaj britaj Esperantistoj konas ilin, kaj estos neeble al mi skribi al ĉiuj pri ili, do, se vi bonvole presigos kiom vi deziras el la letero, certe impresos al la konatuloj, kaj eble al aliaj legantoj.

“ S-ro Verbeken estis ĝis antaŭ 3 jaroj la U.E.A. konsulo en Namur. Li ĉeestis la Antverpenan Kongreson, kaj la semajnon poste, iris en la Kongolandon kiel registara administranto de Kilwa, Kalanga.

“ Li tie laboris dum preskaŭ 3 jaroj, tutsola, inter la nigruloj.

“ Unu—du fojojn, vojaĝantoj, kiuj enpenetris, en Centran Afrikon, vizitis lin. Inter ili troviĝis Holanda jurnalisto, al kiu li propagandis Esperanton.

“ La Holandano respondis, ‘ Vi estas la dua Esperantisto, kiun mi renkontis en Centra Afriko, kaj certe, kiam mi renkontos trian, mi fariĝos Esperantisto.’

“ S-ro Verbeken multe laboris je la instruado de la nigruloj krom siaj devoj kiel administranto, kaj fondis ‘ Mission Station ’ tie. Li konvinkiĝis, ke tiu estas lia vivlaboro, kaj revenis en Namur en jan de Junio, 1914, intencante post kelkmonata restado ĉe siaj gepatroj, reveni en Kongolandon por resti dek jarojn. Anstataŭ tio, li estas malliberigita milita en Holando.

JENNY FIELDING.

De ALBERT MARGOT, Belgischer Kriegsgefangener, Rodelbahn Ingenieur, Reitschule, Soltau, Hannover, Germany.

4. 11. 14.

“ Depost la 24a de Aŭgusto mi estas milita malliberigito en Germanujo. Mi estas en bona sano, kaj nevundita. Bonvole donu al mi novajojn de vi, kaj se eble sendu novajojn pri mi al mia familio en Namur...

Ricevita 24. 11. 14.

“ SOLTAU, 15. 12. 14.

“ Mi ricevis kun granda plezuro vian karton de la 26a de Novembro. Mi per ĝi sciigas, ke vi intencas sendi al mi pakajon, kaj tuj post la ricevo mi sciigos vin.

“ Mi estis kaptita je la 24a de Aŭgusto proksime al Dinant. Vi ne povus rekoni plu tiun belan valon de la Meuse. Ho ve! ĝi estas plena de ruinoj kaj el Dinant restas nenio. La tuta urbo estis forbruligita, bombardita aŭ detruita. Ĝi estas nun kiel dezerto. Ĉe Namur, kiu estis bombardita kaj kie mi batalis, unu kvarono de la urbo estis forbruligita. Feliĉe nia domo restas.

“ Mi jam ricevis 4 leterojn de mia frato, Emily. Mia familio estas en bona sano...

ALBERT MARGOT.

De AUGUSTE VERBEKEN, 3e batterie de place d'Anvers, Dépot des Internés, Amersfoort, Holando.

27. 11. 14.

“ Depost mia reveno el Kongolando je Junio 1a, mi estis tre okupata ĝis la deklaracio de la terura afero, kiu frapis la tutan Eŭropon. Kiajn tagojn mi vivis dum la 3 pasintaj monatoj! Mi ne povus al vi priskribi ilin. La morto maltrafis min ofte; mi estis unue en Namur; mi sukcesis eliri de la batalego; mi iris en Francujon, batalanta kun la francaj kaj britaj soldatoj; mi revenis al Antverpeno, kie denove mi renkontis la malamikojn. De ĉi tie mi ankaŭ sukcesis eliri; nia celo estis iri al Ostendo, sed baldaŭ ni estis devigitaj

eniri Holandon; nevolante ke la malamiko kaptu nin. Nun ni estas en Holando. Dum la lasta semajno mia patro vizitis min; mi ne sciis ion plu pri miaj parencoj depost mia foriro el Namur. Ĉiuj estas sanaj spite de la teruraj spertoj (, kiujn ili suferis.

“ Mi serĉis Esperantan libron ĉi tie; mi nur trovis malgravan gramatikon Holandan. Se vi povus sendi al mi malgrandan vortaron, mi estus kontentega kaj, se eble, jurnalon.

“ Ĉi tie ni estas malliberaj, sed la militestraro estas bona al ni. Ni restados ĉi-tie ĝis la fino de la milito. Ve! tiom da forteco perdata por nia sankta afero! Esti trankvilaj dum aliaj senĉese bataladas. Tiu penso maltrankviligas min. Mi volus reveni tien, kie miaj fratoj troviĝas. Mi ŝatus, ke Holando aliĝu al ni; mi bedaŭras pro Holando, sed estus plibone por ni. Kie estas niaj revoj pri universala paco? Sed ne estas nia kulpo. Ili atakis nin, kaj ni nur defendas nin.

14. 12. 14.

“ La malgranda franca-esperanto vortaro, kiun vi sendis al mi estas tre utila. Mi intencas uzi miajn liberajn horojn por instrui Esperanton al miaj kunnalliberuloj.

“ Vi memoras la ‘ Granda Placo ’ en Namur. Ĝi nun estas nur amaso da ruinoj. Mia familio, kiu loĝis proksime al ĝi, estis devigita forlasi la domon dum la nokto, portante kion ĝi povis, ĉar la brulo minacis ĝin. Dum la antaŭaj tagoj germanaj soldatoj okupis mian ĉambron. Ili deprenis el ĝi la valorajojn, kiujn mi elportis el la Kongolando. Sed, mi ne devas tro pensi pri tio, ĉar feliĉe, ili ne kondutis malbone kontraŭ miaj parencoj.

“ Mi dankas vin por la novajoj pri Albert Margot. Mi skribos al li. La germana militestraro devigis lian fraton Louis konduki aŭtomobilon al la batalkampo por forporti la vunditojn de la malamiko.

“ Vi do iris al Parizo por ĉeesti la Esperantan Kongreson.

“ Kio okazos al nia movado? Mi volus skribi al Esperantista Klubo en Amsterdamo aŭ la Hago, sed mi ne havas adresojn. Ĉu vi bonvole sendos al mi adresojn de Holandaj samideanoj, kaj mi skribos al ili.

“ Dum mi estis en Francujo post la foriro el Namur, mi fratiĝis ofte kun viaj britaj soldatoj, kaj ni interŝanĝis memorajn.

AUGUSTE VERBEKEN.

KIU ESTOS LA LINGVO DE LA PACINTERKONSENTO?

S-ro Page, en Januara B.E., bone priskribas la utilon de Esperanto, kiel la lingvo kiun oni devus uzi en la Akto de Interkonsento. Se tiu uzo efektiviĝus, multaj homoj en ĉiuj nacioj, ne atendante la oficialajn naciajn tradukojn, tuj komprenus la ĝustan signifon de la frazoj uzitaj. Sed mi opinias, ke, bedaŭrinde, la Interkonsento ne estos redaktita Esperante; ĉar la “ Altaj Kontraktantaj Partioj ” mem ne komprenas, kaj tiutempe ne komprenos la lingvon. Eĉ S-ro Page ne subskribis dokumenton, kiun li ne povus kompreni. Sendube, estos ĝis la skribtempo sufice da tempo, por ke tiuj partoj ellernu la lingvon. Sed ili tion ne volos.

Sajnas do, ke klopoj, kiuj celas postuli la uzon de Esperanto tiumaniere malsukcesos. La bona okazo de Esperantistoj venos post la publikigo; ĉar ĉiu nacio devos traduki, el la franca, la Interkonsenton en sian nacian lingvon. Tiam ni povus montri, ke *oficiale* Esperanto, jam bone uzata en ĉiu parto de la mondo, suficius por ĉiuj partoj. Sed, eĉ se la Interkonsento estus skribita Esperante, en ĉiu lando tiuj, kiuj ne komprenas Esperanton, postulus nacian tradukon.

JAMES ROBBIE.

ESPERANTA STENOGRAFIO.

(Nefermita letero al la Redaktoro de THE BRITISH ESPERANTIST).

Mi legis kun intereso vian recenzon pri mia alfaro de la Pitmana Stenografo al Esperanto, kaj viaj kritikoj ŝajnis al mi ĝustaj. Kun des pli granda plenuro, do, mi anoncas, ke mi ĵus eldonis trian eldonon, multe pli plenan, en kiu mi kredas ke mi sukcessis forigi almenaŭ kelkajn el la priplenditajoj. Ĉar mi ne scias, kiu jam posedas la antaŭajn eldonojn, mi uzas la okazon sciigi, ke mi senpage sendos la novan eldonon al ĉiu petanto, kiu jam posedas la antaŭan; por aliaj la prezo estas 50 sd. (1s.).

Mi ricevis diversajn leterojn, al kiuj mi petas permeson ĉi tie mallonge respondi. Oni povas diri ĝenerale, ke ekzistas du rivalaj skoloj de stenografaj sistemoj, la *geometria* kaj la *kursiva*. En Anglujo plejofte oni uzas la geometrian sistemon (Pitmana), sur la Kontinento plej ofte la kursivan. Pri la relativaj meritoj de la du skoloj mi ĉi tie ne esprimos opinion. Sed mi notas, ke el tio, ke la Pitmana sistemo ordinare skribas la konsonantojn, ellasante la vokalojn, dum la kursivaj sistemoj ordinare enkonturigas la vokalojn, kelkaj personoj argumentas (kiel iam mi mem), ke por skribi lingvon tiel vokaloplenan kiel Esperanto la Pitmana sistemo malpli, aŭ tute ne, taŭgas. Mi, kontraŭe, opinias, ke la Pitmana sistemo *iom modifita* povas taŭgi por Esperanto egale, aŭ eĉ pli bone ol, por la angla lingvo.

Mi ne celas diskuti pri tio, kia modifo de la Pitmana sistemo estas la plej taŭga; sed nur atentigi pri la neceseco de *ia* modifo. La Pitmana sistemo estas farita kun celo prezenti la anglan lingvon, kion ĝi faras admirinde; sed ĝuste pro tio, oni ne povas atendi, ke sen ia ŝango ĝi egale bone taŭgos por skribi alian lingvon esence tre malsimilan. (La sama rimarko estas aplikebla, kompreneble, al ĉiu nacia sistemo).

Mi ekzempligos. Al ĉiu Esperanta radiko devas esti almetebaj facile, kaj sen kreo de konfuzo 58 gramatikaj finaĵoj, pli ol 50 afiksoj, multaj prepozicioj prefiksoj, kaj granda nombro da aliaj radikoj. Se oni ne skribas la vokalojn, aŭ preskaŭ ne, estas nepre necese povi tuj kaj senhezite distingi per la konturo (mi uzas la unuan konsonantkombinajon, kiu venas en mian kapon—BRKT plus A) inter similajoj kiaj *barketo*, *barakto*, *braketo*, *brakteo*, *baraketo*, *brakata*, *brahita*, *brakota*. Estas dezirinde, ke por logika lingvo, ĉiu regulo estu universale aplikebla. Pro la ofteco de la 25 eblaj vokalkunmetajoj, ekz., *kanaano*, *mieno*, *leono*, *foiro*, *gui*, *boae*, k.s., estas necese povi skribi ilin klare kaj rapide. Ĉiujn ĉi kondiĉojn, mi kredas, la Pitmana sistemo nemodifite ne plenumas. Plua ekzemplo:—La streko aŭ hoko N, kaj skribado en pozicio, sciaj, ne suficias por distinge skribi *en*, *unu*, *ajn*, *naŭ*, *ne*, *ni*, *nu*, *ano*, *ino*, *ono*, *nea*, *nee*, *nei*, *neo*, *neu*, *ia*, *ien*, *ion*, *iun*, *iajn*, *iujn*, *ia ajn*, *ie ajn*, *io ajn*, *iu ajn*; la radikfinajojn *-an*, *-en'*, *-in'*, *-on'*, *-un'*, kaj la akuzativojn *-an*, *-en*, *-in*, *-on*, *-un*, kun iliaj pluraloj. Tamen la enmeto de la vokalo treege malhelpus la rapidecon de skribo.

Espercble, la supraj ekzemploj suficias komprengi, ke, se oni celas ne montri, ke Esperanto estas skribebla sed skribi Esperanton, necese estas *iom modifi* la Pitmanan (aŭ kiun ajan nacian) sistemon, konforme al la apartaj postuloj de la lingvo.

Ĉi tiu iom tro longa letero, kiel jam dirite, celas ne viajn tute ĝustajn rimarkojn, sed la eble iom senpensajn kritikojn de kelkaj korespondantoj, kiujn ĉiujn mi ne povis respondi individue kaj detale.

M. C. BUTLER.

Alilandaj Sciigoj.

Rusujo.—Dum unu el la sabataj kunvenoj de la grupo en Moskvo, S-ro S. Ĉudinskij, volontulo el Kiev, rakontis pri siaj militimpresoj. Interalie, S-ro Ĉudinskij priskribis, kiel li militkaptis germanan oficiron esperantiston, kaj poste servis, dank'al Esperanto, kiel interpretisto inter militkaptitoj kaj rusoj. En Moskva Urba Popol-Universitato de Samjavskij organiziĝis grupo, per kies klopo en la studenta librovendejo de nun estas aĉetablaj Esperantaj libroj. La libroj estas volente aĉetataj. **VARSOVIO.**—Nia Majstro, D-ro Zaměnhof, nun fartas ne tre bone. La teruroj de la milito dolorigas lian malfortan koron. Ni ĉiuj deziru, ke nia kara Majstro resaniĝu kiel eble plej baldaŭ. En PETROGRADO, KIEV, TURJEV, JAPOROJE-KAMENSKOJE, SARATOV, ASTRAHAN, IRKUTSK la movado daŭre progresadas.

La polaj samideanoj en **Galicio** perdis tre ŝatatan kunlaboranton en la universitata profesoro, D-ro Odo Bujwid, mortinta sekve de aŭtomobila akcidento. D-ro Bujwid, fama bakteriologo, al kiu la scienco dankas gravajn malkovrojn, estas konata al la Esperantistaro kiel meritplena prezidinto de la Loka Organiza Komitato de la Jubilea Kongreso de Esperanto en Krakow. La partoprenintoj de tiu kongreso certe ankoraŭ memoros la tre simpatian viron, kiu helpis aranĝi la grandiozan, brilan feston. Krome li estis la prezidanto de Societo Esperanto en Krakow, kaj ankoraŭ en Junio nunjara li prezidis la 2an kongreson de polaj Esperantistoj en Bochnia. En sia urbo li estis influenda persono, kiu estante tre fervora Esperantisto tre helpis al la progreso de nia afero.—*Laŭ Germana Esperantisto.*

Puerto Rica.—En grava ĉiutaga gazeto de PONCE jus aperis en la hispana lingvo traduko de "Respondo Teologa" el nia numero de Novembro. Oni sciigis nin, ke tiu artikolo pro ĝia aktuala intereso estis vaste legata, tiamaniere ne nur atinginte sian propran celon, sed samtempe atentigante la legantojn al la ekzisto kaj utiloj de nia lingvo.



Germanaj Militkaptitoj en Japanujo.

El la germanaj militkaptitoj el Cintao 24 oficiroj kaj 534 simplaj soldatoj restas ankoraŭ en hospitaloj en Cintao pro aŭ vundiĝo aŭ malsano, kaj estas sendotaj kiam iliaj fartoj pliboniĝos.

Kune kun tiuj ĉi la tuta nombro de la militkaptitoj germanaj estas 222 oficiroj kaj 4,126 simplaj soldatoj, kiuj kune sumas je 4,348.

Ili ĉiuj estas bone prizorgataj, kaj kvankam ankoraŭ ne estas permesitaj promenadi laŭvole, oni antaŭvidas tiun privilegion en la proksima estonteco. Krom 2 aŭ 3 okazoj de malobeemo kaj de malbona konduto, ili estas, oni diras, en bona ordo kaj ŝate ĝuas nian gastamon. Laŭraporte Admiralo Waldeck eĉ skribis al iu amiko en Peking dirante, ke la gastamo, kiun li ricevas en Japanujo, estas ĉio, kio estas dezirita. Sendube germanoj estas kontentaj.

Iuj tamen opinias, ke la gastamo montrita al ili de nia registro estas pli ol necesa, kaj ke oni ne devas esti tiel malavarema kvankam pro kompato.—*El Osaka Mainichi*, tradukita de K. TAKAHASI, Del., U.E.A., Hiroshima, Japanujo.

Spertoj de Bohema Kongresirinto.

Kelkajn semajnojn antaŭ la malfermo de la Xa Tutmonda Esperantista Kongreso mi alvenis en Parizon por ekkoni la vidindajojn de tiu ĉi fama mondurbo.

Vizitante la preparajn kunsidojn de la Xa, mi havis la plezuron vidi niajn Parizajn samideanojn, kiel ili klopadas, ke la kongreso fariĝu grava manifesto ĝis nun ankoraŭ nevidita.

Aliĝis jam preskaŭ 5 000 da Esperantistoj el ĉiuj mondpartoj, kaj neniu dubis pri ebleco aŭ pri malsukceso de la Xa.

La lastan semajnon antaŭ la malferma kunsido, ĉio jam vigle moviĝadis en palaco Gaumont kaj baldaŭ estis ĉiuj ornamajoj kaj dekorajoj pretaj—oni nur atendis la baldaŭ alvenontajn gastojn.

Multaj Parizanoj haltis apud palaco Gaumont demandante pri la signifo de nia bela stelo.

Ankaŭ la laboristoj preparis la "Laborborson" por la laborista esperanta kongreso.

Subite ekvastiĝis la famo pri milito. Ĉar la danĝero de homobuĉado ĉiumomente pli proksimiĝis, oni ne sciis, ĉu la kongreso okazos aŭ ne. Sed niaj Parizaj samideanoj senhalte laboris ĝis la lastaj tagoj.

Sur la stratoj mi vidis multe da laboristoj, kiuj energie protestis kontraŭ la milito, sed vane.

Jam la tagon (31. 7.), kiam estis mortigita Jaurès, la fama gvidisto de socialista partio en Francujo, oni diris, ke kun Jaurès mortis ankaŭ la paco. Jaurès estis unu el la ĉefaj pacamantoj kaj fervora propagandisto de paco.

Dum unu semajno ĉiuj pacemaj ĵurnaloj fariĝis militemaj.

Jam foriradis multaj soldatoj al la landlimo por eble plu ne reveni.

La tagon de la malferma kunsido la tuta palaco Gaumont estis jam transformita en fabelan kastelon kaj nenio mankis. La okuloj de alvenintoj estis preskaŭ blindigitaj de beleco kaj lukso, kiu estis ĉie videbla kaj tiu tuta laboro kaj arango estis vana. Oni plorus memorante pri tio.

Kompreneble la kongresanoj mankis. Nur kelkaj * anglaj kaj hispanaj samideanoj kuraĝe alvenis supozante, ke la milito tamen ne okazos.

La vagonaroj el la direkto de Germanujo plu ne alvenadis kaj anstataŭ ili, forveturadis ĉiumomente vagonaroj kun mobilizitaj soldatoj al la germana landlimo.

La milito eksplodis. La germanoj kaj Aŭstrianoj loĝantaj en Parizo, penadis por atingi la stacidomon, de kie devis laudire forveturi la lastaj vagonaroj, kiuj transportus ilin al hejmlandoj.

Car multaj Parizaj samideanoj estis jam vikitaj al militservo, restis en kongresejo preskaŭ nur fremduloj, kiuj ne sciis kion fari. Kelkaj penis tuj forveturi, la aliaj konsilis trankvile atendi, ĝis la neatendita haoso iom pliklarigos.

La Parizaj aŭtobusoj momente transiris en la manojn de militistoj.

Kelkaj linioj de la subtera elektra fervojo ĉesis funkcii pro manko de la oficistoj, kiuj foriris en batalejon.

Vespere ni vidis sur la ĉielo lumajn strojn de reflektoroj, kiuj serĉis eble alvenontajn germanajn aeroplanojn.

La ĵurnaloj estis rapide forvenditaj, kaj ĉiu interesiĝis sole pri milito.

La granda rado de kultura laboro haltis. Por kiom da tempo?

La muzeoj estis fermitaj, kaj ĉiuj gravaj konstruaĵoj estis gardataj de soldatoj.

Detalojn pri la neokazinta "deka," skribis jam aliaj samideanoj en la pasintaj numeroj de THE BRITISH ESPERANTIST, sekve mi ne volas plu lacigi la legantojn per la samaj sciigoj kaj mi rakontos nur kelkajn miajn postkongresajn travivajojn.

En Parizo mi renkontis ankoraŭ aliajn bohemajn samideanojn. Inter ili estis ankaŭ miaj amikoj E. Kühul kaj E. Urban.

Car ni ne povis reveni Bohemujon, restis al ni sola vagado tra la Parizaj stratoj kiel tempopasigilo.

Laŭ militistaj ordonoj ni devis nin prezenti ĉe ia oficejo por esti tie enskribitaj kiel militkapititoj.

Por plenumi tiun ĉi devon, ni atendis du tagojn sur la strato antaŭ lernejo, kie oni laŭvice enskribis ĉiujn aŭstrianojn kaj germanojn.

Mia amiko S-ro Urban forveturis post kelkaj tagoj la kamparon kiel militkapitito.

Mi kun amiko Kühul kaj aliaj ses bohemaj gesamideanoj sukcesis, danke al specialaj favoraj cirkonstancoj kaj helpo de samideanoj, ricevi permeson de libera restado en Parizo.

Car la muzeoj estis fermitaj, ni pasigadis la tempon promenante tra la bulvardoj kaj observante la stratajn okazintajojn.

La famaj bulvardoj ne montris plu sian kutiman bruon vivon, ĉar la Parizana gajeco preskaŭ tute malaperis. La magazenoj kaj multaj kafejoj estis fermitaj kaj sur la fermitaj pordoj ni ofte trovis sciigon, ke la mastro kun la tuta personaro foriris en batalkampon.

La aŭtomobiloj mankis kaj ni povis rimarki nur militistajn aŭtomobilojn kaj tiujn de la ruĝa kruco.

Fremduloj kaj multaj riĉuloj laŭpove forveturis, ĉar oni timis, ke germanoj sieĝos Parizon. La policanoj petis ofte pasportojn de preterpasantoj por malhelpi la spionadon, ĉar dum la milito ĉiu fremdulo ŝajnas esti spiono. Cetere la ekscitita loĝantaro mem tre atente observis ĉiun fremdulon.

En tramvojoj kaj sur la stratoj mi ne aŭdis plu alian lingvon ol la francan, ĉar la restintaj timis paroli sian gepatran lingvon.

La kafejoj kaj multnombraj "Baroj" devis esti laŭ polica ordo vespere je frua horo fermitaj.

La modo ankaŭ ŝanĝiĝis. Multaj virinoj surportadis nigran veston kaj la plimulto el ili ploris. Ĉu la sekvo de tio ĉi estos, ke la virinoj en estonta tempo zorgos pli multe pri la paco ol pri modo?

Car la virinoj ne estas grava faktoro en la decido pri la milito?

Kun plormalsekaj okuloj ili nun trairadas la stratojn kaj atendas, ĉu revenos la amataj filoj, patroj, edzoj aŭ fratoj, kiuj staras nun ie sur la batalkampo.

Tempo post tempo Parizo komencis reprenadi la kutiman aspekton kiel antaŭ la milito, ĉar la stratoj plivigliĝis.

Iun tagon, je la fino de monato Aŭgusto, sidante en unu malgranda parko, ni subite aŭdis kvar sinsekvan pafojn. Posttagmeze ni legis jam en la ĵurnaloj, ke iu germana aviadisto superflugis Parizon kaj jetis kvar bombojn, kies bruon ni aŭdis.

Kompreneble, ni vizitis la lokojn, kien la bomboj falis, sed multon ni ne vidis. La difektoj ne estis grandaj kaj pri akcidentoj la ĵurnaloj silentis aŭ devis silenti.

De tiu tago fariĝis la vizitado de germanaj aeroplanoj ĉiutaga.

Pri la akcidentoj ni neniam ion ekskii, kaj la bomboj falis tamen sur la homoplenajn stratojn.

Kelkajn tagojn poste mi estis kun tri bohemaj geamikoj en nia Centra Oficejo kaj, kiam ni volis reveni hejmen, ni ekvidis super niaj kapoj grandan

* Kelkaj centoj da ili.—RED.).

birdon. Gi estis germana aeroplano nomata "Taube" (kolombo).

Ni haltis en strato Berlin—nun nomata rue de Liège—proksime de strato Amsterdamm, kiam ni subite aŭdis teruran pafon, kiun sekvis tintado de vitro el la rompitaj fenestroj.

Je distanco de kvindek metroj de ni en strato Moscou eksplodis la jetita bombo. La homoj forkuradis de la loko de malfeliĉo, sed ni rapide kuris tien por vidi, kio okazis.

La fumo de eksplodinta bombo baldaŭ malaperis kaj ni vidis—ho, terura rememoro—kvar vunditojn aŭ jam mortantojn, kiuj kuſis sur amaso da rompita vitro, tute sangomakulitaj. El ili estis du viroj kaj du virinoj.

La homoj rapide forportis ilin por malhelpi la sangadon. Unu viro kuſis senmove sur la tero kaj la alia vundito—maljuna sinjoro—kun sanganta kapo penadis por foriri sen helpo de ĉirkaŭstarantoj.

Kaj la malfeliĉaj virinoj? Terura sceno, elkore mi malbenis la tutan militon kun ĉiuj ĝiaj mirindaj eltrovajoj. Kaj al tiu ĉi sankta milito benas miloj da pastroj kaj por la venko pregas milionoj da homoj.

La amasiĝintaj homoj laŭte insultis la aviadiston, sed li ne aŭdis. Ankoraŭ kelkajn bombojn li jetis kaj forflugis kun fiera mieno, ke li plenumis sian sanktan devon.

Kia dolêa devo?

Kian valoron havas la diplomataj promesoj faritaj en Hago, se oni kun senkulpa mieno permesas similajn krimojn?

Paca palaco, kiom ci estas ridinda!

La jurnaloj sub influo de pacamaj diplomatoj ŝangas la pacaman popolon en sangavidajn bestojn.

La ĉefa kaŭzo de milito estas, ke la homoj ne scias memstare pensi, ĉar alimaniere ili ne permesus, ke oni faru en ilia nomo kaj kun ilia helpo tiom da krimoj.

Antaŭ du jaroj malbenis la *civilizitaj* nacioj la balkanan militon, kaj oni eĉ ne trovis sufice da vortoj por esprimi sian malestimon al la militantaj nacioj. Kaj hodiaŭ?

Hodiaŭ ĝi estas la sankta milito de civilizitaj nacioj.

Dio benu ilin!

Sed ve—al la kaŭzintoj!

Kiom pli da Esperantistoj ni bezonus por krei la veran pacon.

Praktike mi estas certa, ke miloj da pacaj societoj sen internacia lingvo ne garantios al ni la pacon. Sed mi estas ankaŭ konvinkita, ke suficius nur kelkaj milionoj da homoj, kiuj scius kaj praktike uzus esperanton por gardi ĉiaman pacon, sed—la homoj ne volas ĝin lerni.

Alia granda malhelpajo estas troa patriotismo.

Ciuj socialistaj kaj similaj internaciaj ideoj restos *utopioj* sen internacia lingvo.

Komence je monato Septembro ni sukcesis—sed kun granda penado—ricevi fervojajn biletojn al la hispana landlimo. Ni estis ok bohemaj geesperantistoj, kiuj veturnis en Hispanujon.

Nia vagonaro faris ses, kelkfoje ankaŭ dudek kilometrojn en horo.

Nia kupeo estis tre komforte kaj lukse aranĝita: Gi havis en la mezo du largajn pordojn, por ke oni povu facile eliri, sed sen ŝuparo. Kvar servitraj fenestroj provizis la kupeon per sunaj radioj kaj freſa aero. Cetere la pordegoj estis ĉiam malfermitaj, do la aero ne mankis al ni. La sidbenkoj estis sufice ŝargaj kaj kiel apogilon mi uzis la dorson de mia najbaro. Simple dirite, ĝi estis la tiel nomata bestvagono.

Feliĉe post sestaga ĝajplena veturnado en tiu vagonaço ni atingis la landlimon kaj de tie post kelkaj koroj ni alveturis en Barcelonon.

Kiom agrabla estis la momento, kiam mi sentis min for el la dangera milito, for el la lando, kie mi antaŭ la milito travivis multe da agrabla monatoj, for el la lando kun kies popolo mi tamen estis vivinta en harmonio. Kaj nun pro kelkaj diplomataj kapricoj, mi fariĝis laŭ ordono de diplomatoj la plej dangera malamiko.

Sed klarigu al la homoj kion ajan, ili ne komprenas, ili ne volas kompreni, ili ŝajnas esti surdaj. Mankas Esperantistoj. Tiuj ĉi almenaŭ komprenas nin kaj ne fariĝas senkompataj bestoj.

Mi ne volas ekspliki la leganton per malagrabla rememoroj, ĉar oni bone scias, ke la popola animo malofte pensas.

Dumvoje ni vidis milojn da vunditaj soldatoj, kiuj kun palaj vizaĝoj regardis indiferente sian ĉirkaŭajon. En tiuj ĉi timigitaj okuloj oni povus multe legi pri beleco de la milito.

Kaj post la milito, kiom da inko kaj papero estos foruzata por klarigi la senkulpecon de ĉiuj militantoj, kaj ve al la kaŭzintoj!

Sed kiu plibonigos la sorton al centmiloj da kripluloj? Eble la morto.

De la tago kiam ni venis en Hispanujon, nia sorto pliboniĝis.

Hispanaj samideanoj akceptis nin tre afable, kaj mi ne estas kapabla esprimi la ĝojojn, kiun ni travivis en iliaj rondoj.

La bohemaj samideanoj instruistinoj devis laŭ ordono de aŭstria konsulo reveni en sian patrujon kaj mi kun amikoj Kühnl kaj Maras entreprenis la vojaĝon tra Hispanujo.

Plej frue mi traveturis Barcelonon kaj en la ĉirkaŭajo ni vizitis la samideanojn en Sabadell, Terassa, Rubi kaj Molins de Rey. De tie ni poste venis al Valencia, Córdoba kaj Málaga.

Cie ni estis tre afable akceptitaj.

En tiu ĉi ŝajne fremda lando ni trovis multe de afablaj amikoj, kies helpo kaj konsilo estas en nunaj malfavoraj cirkonstancoj netaksebla. Gi meritas pli ol dankon, kaj ĝi restos por ni neforgesebla memorajo.

V.C.

* * * *

Donacoj por la Helpo de la Belgaj Rifugintoj en Holando.

Per la Nederlanda Federacio Esperantista.

TRIA LISTO (vidu N-on de Januaro, pg. 19).

Antaŭa sumo	£19 19 9
F-ino Edith Pratt (balance of profit on the sale of copies of Christmas booklet for children, <i>Holly Boy and the Fairies</i> , totalling, with previous remittance, the sum of £5)	3 12 0
S-ino Pratt	1 0 0
	£24 11 9

Pluaj monsumojn oni danke ricevos.

* * * *

La Riparota Tegmento.—Pluvas. Vilaĝa butikisto staras en angulo de sia budeto, rifugante kontraŭ la pluvo, kiu gutas tra la malnova tegmento. — Butikisto, kial vi ne riparas vian tegmenton, — demandas la vilaĝano. — Car pluvas, — respondas la butikisto. — Kial do vi ne riparas dum bona vetero? — Car tiam mi ĝuste ne bezonas la riparon. — *El la lingvo kartvela, "Ondo de Esperanto."*

Open Letter to Bishop Welldon, Dean of Manchester.

VERY REVEREND SIR,—

In your inaugural address at the Annual Conference of Educational Associations, reported in *The Times* of January 5, you made some important statements with regard to the education of the young.

There will be general agreement with your statement that the few years spent by children in schools must be spent in the best possible manner. "There must be no waste of time, no sacrifice of subjects that go to enhance civic efficiency, to merely useless embellishments."

For the majority of men who do the ordinary every-day work of the world, and who are not in professional life, the time spent in school in the study of Latin and Greek and even modern languages is largely wasted. This is gradually being recognised. Greek has almost gone; Latin will ere long follow in its train.

You are reported to have said that you "did not believe the world would ever gain much help from an artificial language like ... Esperanto, for that was an artificial product, not, as every true language must be, a growth." It is obvious that you were speaking under a misconception of what Esperanto really is. You make the mistake of regarding what you are pleased to call "an artificial language" as a mechanical, soulless piece of work, incapable of growth or development, and it is due to Esperanto that the facts, probably unknown to you, should be plainly stated.

It is incorrect to say that Esperanto is not a growth. A jungle is a growth; so is a garden. And Esperanto may be likened to a garden, and the natural languages to a jungle. Dr. Zamenhof, the author of Esperanto, may be likened to a skilful horticulturist who has gone out into the jungle and selected out of the chaos the best and most useful trees and flowers, and transplanted them into the Esperanto garden, to grow there in regularity and in order and in beauty. He has not put anything into Esperanto which was not already in the natural languages. The Esperanto "roots" are found in the "jungle," so are the system of word-building, the table of "correlatives," and the grammatical progression, which are important features of Esperanto. Dr. Zamenhof has produced order where before chaos reigned. He has reduced masses of irregularities and exceptions and absurdities to the acme of simplicity. He has eliminated gutturals, half vowels and sounds unpleasant to the ear and difficult for the tongue, and made the language euphonious and musical.

It is therefore not putting its claims too high to say that Esperanto, to a greater degree than any natural language, is a growth, with its roots planted deep in antiquity. That this language is growing and living and evolving, as true languages grow and live and evolve, is the conviction gained by twenty-eight years' experience. Its wide and varied use, its adaptation to literature, not only as an instrument of translation, but for original work, its application to commercial purposes, its use in poetry and song, proclaim it as a living language of a living people.

When the real value of Esperanto is appreciated, it will be found taking the place of the dead languages in the school curriculum, and providing the element in education which you appear to desiderate. It will be found that it can supply the mental training, which is perhaps the only valid excuse given for retaining the dead languages; that it gives an absolutely clear and logical conception of grammar and grammatical construction, which is of the greatest possible value as a guide to the proper use of the English language; and that one who has mastered it obtains such a grasp of the essentials of language as to simplify the task of learning other languages. A youth with a knowledge of Esperanto, who afterwards desires for use in his business or profession or for his own pleasure to learn Latin and Greek, will find in Esperanto a key to these languages, which will enable him to master them in much less than the time now necessary. Esperanto has a liberalising influence on the mind from the wide outlook and broad sympathies which it encourages.

Esperanto has a positive ethical side. You have well pointed out in your address the peril of a false or vicious education, and that the seed-plot of the present War was in Germany, the university and the school. If Esperanto were taught in schools, there would be concurrently taught to the young the principles of peace and brotherhood and international goodwill, for the main consideration in the mind of Dr. Zamenhof, the author of the language, was to provide an instrument for removing the misunderstandings among the peoples of the world. If educationists in the future are desirous of promoting among the young the desire for the blessings of peace, they could not find a better way of doing so than by placing Esperanto on the curriculum.

W. M. PAGE,
Fellow of the British Esperanto Association,
President of Edinburgh Esperanto Society.

Belgujo.—Iom da Historio !

Kiam la unuaj belgoj enloĝiĝis neniu ĝuste scias sed, laŭ la plimulto de la historiistoj, ili alvenis Gallujon dum la unua parto de la kvara jarcento A.K. Ili venis el Rejnlando kune kun la galoj kaj miksiĝis kun la enloĝantoj, la keltoj.

Ili estis inter la plej militemaj kaj kuraĝaj gentoj, samtempe inter la plej intelligentaj kaj moralaj. Inter siaj dioj, ili havis tiujn de la komerco, de l' arto, de la poezio kaj tiun de la elokventeco. Iliaj pastroj, la druidoj, pacemaj kaj larganimaj viroj, estis senpartiaj juĝistoj en la diversaj malkonsentoj aŭ disutoj lokaj; ili provis instrui la popolon pri la senmorteco de la animo.

La belgoj de tiu epoko, kiel ĝenerale la keltoj, estis tre jaluzaj je sia libereco, kaj por ĝin konservi, ĉiu homo aliĝis al iu grupo sub la estrado de potenca bienposedanto aŭ preĝejestro, kaj tiel fondiĝis la unuaj urboj. Ĉiu grupo aŭ urbanaro aliĝis al siaj najbaroj tiel formante federacion, kies interesoj estis prizorgataj de deputatoj elektitaj de la popolo mem. Tiu estis la unua parlamento !

En 122 A.K. la Romanoj invadis diversajn gallajn provincojn kaj Belgujon en 58 A.K., dum Holando kaj la norda parto de nia lando estis transirata de la germanoj, kiuj el kelkaj lokoj forigis la enloĝantojn kaj en aliaj miksiĝis kun ili.

Ĉe la alveno de la Romanoj, ĉiuj gentoj en la belga teritorio: la Treviroj (nuna provinco de Luxembourg), la Adriatikoj (Namur), la Nervioj (Brabant, Hainaut, kaj Orienta Flandro—ĉiuj-parto—), la Eburonoj (Limburg, Liège kaj Brabant (parto), la Menapioj kaj la Morinoj (du Flandraj provincoj) kaj la Ambivaritoj (Antverpeno) sin armis kaj decidis repuŝi la invadantojn. Dum kvin jaroj, ĉiuj kune, la belgoj kuraĝe militis kontraŭ la armeoj de Cezaro, sed fine estis venkitaj pro la granda diferenco inter la nombro de soldatoj kaj la kvalito de armiloj. Tiel mirigita pro la heroa kaj senhalta kontraŭstaro de la malbone armitaj belgoj estis la Romana generalo, ke li skribis en sia verko, " Pri la Galla Milito " : " El ĉiuj Galoj, la Belgoj estas la plej kuraĝaj."

Dum ĉirkaŭ 500 jaroj niaj pravaoj restis subpremataj de la imperiaj venkintoj; tamen tuj post la landa pacigo la Romanoj provis forgesigi al siaj novaj regatoj siajn kruelajojn kaj la kaŭzitajn mizerojn. La diversaj gentoj konservis siajn terojn kaj aliajn posedajojn, post pago de monpuno de 40,000,000 da sestercoj (proksimume £320,000). Kelkaj fariĝis tute sendependaj, kaj ĝenerale la Romana estrado

havis bonan profitdonan rezultaton por la tuta lando. La belgoj akceptis la ideojn, kutimojn kaj lingvon de la pli civilizita nacio. Ankaŭ, dum tiu periodo, disvastiĝis en niaj provincoj la nova religio—Kristanismo—enkondukita de kelkaj el la Romanaj soldatoj.

Ĉirkaŭ la mezo de la tria jarcento aperis en nia lando novaj gentoj, inter kiuj estis la frankoj. Komence ili detruis parton de la de si invaditaj provincoj; sed je la kvara jarcento ili sin tie definitive fiksis kaj pace vivis flanke de siaj belgaj najbaroj. Je la komenco de la sekvinta jarcento ili helpis repuŝi la vandalojn, hunojn kaj gotojn, kiuj siavice invadis la landon kaj kruele militis kontraŭ la enloĝantojn. Sekve de tiu komuna defendo de siaj posedajoj, la belgoj kaj frankoj formis alion kun celo liberigi Gallujon de la Romanoj, kiuj sciis ilin premadi sed ne protekti kontraŭ la barbaroj.

Post la forigo de la malamiko Romana en 415 P.K., la frankoj prenis por si ĉiujn bienojn donitajn de la imperiestroj al la armeoj kaj la imperiestrajn posedajojn mem. En kelkaj okazoj, teraĵoj estis donitaj kiel bieno heredota de la familio; en aliaj, kiel donaco portempa, reprenebla laŭ la bonvolo de la reĝo, ĉu dum la vivo de la donacito, ĉu je lia morto; fine, kiel teraĵo luebla kontraŭ iu monpago.

La efektiva rezultato de tiu tera disdonado estis, ke Belgujo fariĝis franka kaj restis tia ĝis la jaro 843.

Dum tiu regado, kaj precipe tuj de post la ĝenerala akceptado de Kristanismo kiel ŝtata religio—post la konvertigo de Clovis kaj de lia armeo en 496—ĉiu homo fariĝis sendependa kaj libera: ĉiuj sklavoj estis liberigitaj, ĉu per ordone de la reĝo aŭ de la pastroj, ĉu per la bonvolo de siaj mastroj.

Multaj abatejoj estis starigitaj en diversaj partoj de Belgujo, kaj, dank' al iliaj monaĥoj la konoj sciencaj kaj literaturaj instruitaj de la Romanoj ne pereis, kvankam ili grandaparte perdiĝis en la popolo pro la sinsekaj militoj de la frankaj reĝoj ĝis la surtronigo de Charlemagne en 771. Li faris ĉion en sia povo por civilizi siajn regatojn; malfermis lernejojn; elpensis leĝojn pri ĉiu fako de la vivo morala, politika, religia, kaj eĉ familia. Ĉiuj de li kreitaj institucioj en lia imperio restis bonefikaj je la popolo spite la multaj bataladoj inter liaj filoj kaj nepoj.

En 843, per la traktado de Verdun finiĝis la vivo de la franka imperio, dividita inter la tri filoj de Ludoviko la Bona, kiam Belgujo, krom Flandro, kiu estis donita al Francujo, fariĝis la propraĵo de Lothaire. Je tiu epoko vere komenciĝas la feŭda periodo, kiam nia lando

dividiĝis en provincoj kvazaŭ sendependaj: graflandoj de Hainaut, Namur kaj Flandro; markizejo de Antverpeno; duklandoj de Brabant, Limburgo kaj Luksemburgo; ekleziaj provincoj de Liège kaj Stavelot-Malmedy. Tiuj landoj estis estritaj de princoj sendependaj unu de la aliaj, ĉu heredaj, ĉu elektitaj de la popolo aŭ kelkafoje dependantaj de la najbaraj imperioj.

Fojon post fojo Flandro aliĝis al Hainaut kaj disiĝis, Namur aliĝis al Flandro kaj al Luksemburgo, la dukoj de Brabant interkonsentis kun la grafoj de Limburg, kiuj siavice formis aliĝon kun la dukoj de Luksemburgo, ĝis fine inter la jaroj 1384 kaj 1444 ĉiuj provincoj belgaj, krom Liège, fariĝis la posedajoj de la Princoj de Burgonjo, ĉu pro edziĝoj, ĉu per aĉeto aŭ militoj.

Dum la multaj militoj de tiu periodo (de 843 ĝis la XVa jarcento proksimume) oni preskaŭ ĉiam trovas Luksemburgo, Namur, Liège kaj Hainaut batalantaj kun Francujo, dum Brabant, Limburg (Holando) kaj Flandro helpis Germanujon. La nobeloj kaj la popoloj, precipe tiuj de Flandro, ne ĉiam akordiĝis pri la militaj aliĝoj, sekve tre ofte batalis unuj kontraŭ la aliaj.

Inter la plej famaj bataloj de tiuj jarcentoj estas: la batalo de Bovines (27 Julio, 1214) kiam la angloj sub imperiestro Othon IVa kun la Flandranoj estis venkitaj de la francoj, kies landon ili esperis detrui; la batalo de Courtrai nomita batalo de la Oraj Spronoj (1ran de Junio, 1302), kiam 20,000 Flandranoj venkis 50,000 francojn, inter kiuj estis la plej noblaj kaj bravaj nobeloj; la batalo de l'Ecluse en 1340, kiam Jakobo Van Artevelde kun siaj Gentaj metiistoj helpis la regionon Eduardon la IIIan de Anglujo kontraŭ Francujo, kiun ili tute venkis.

La ĉefaj okazintajoj de la feŭda periodo, sed precipe je la fino de la XIa, dum la XIIa kaj la XIIIa jarcentoj estas la povo gajnita de la diversaj metiaj organizoj kaj la favoraj cedoj donitaj al la plimulto el la belgaj urboj. La industrio kaj la komerco ĉie kreskis, dum naskiĝis la artoj pentra, arhitektura kaj beletristika. Inter la institucioj fonditaj ni kalkulas la Universitaton de Louvain kaj diversajn gravajn monaĥejojn por gereligiuloj instruistoj.

De post la aliĝo de Luksemburgo al la Burgonjaj posedajoj per la edziĝo de Elizabeto de Gorlitz kun Antonio de Burgonjo, ĉiuj niaj provincoj (krom la episkopaj provincoj de Liège kaj Stavelot-Malmedy) restis en la posedo de la dukoj ĝis la morto de Mario de Burgonjo en 1482. Si edziniĝis kun Maksimiliano de

Aŭstrujo, kiu heredis nian landon kaj tiel pli grandigis sian aŭstran imperion.

Li tre ofte malkonsentis kun siaj regatoj kaj neniam provis ilin kompreni—militoj kontraŭ kaj aliĝoj kun liaj najbaroj sin sekvis senhalte. En 1512, Belgujo kaj la aliaj Burgonjaj provincoj fariĝis aŭtonoma parto de la imperio aŭstra sub la nomo de Cirklo de Burgonjo. Fariĝinte imperiestro, Maksimiliano lasis la estradon de la Nederlandoj (Belgujo kaj Holando) al sia filo Filipo la Bela, kaj dum la regado de tiu princo, la lando ektrovis la profitojn havigotajn pro la aliĝo al la imperio.

La komerco kaj industrio prosperis multe pli ol dum la hispana regado, kaj tiel daŭris dum la estrado de Margaret, onklino, kaj Mario, fratino de Filipo. Lia sukcesinto, Karlo V., naskigis multajn militojn tra la tutaj Eŭropo pro sia ambicio kaj religia mallarĝanimeco.

La Reformo Protestanta triumfis en la norda parto de Belgujo, Holando kaj Germanujo dum la plimulto el la enloĝantoj de la valonaj provincoj kaj de Francujo restis fidelaj al la Roma katolicismo.

En 1535, Mario ordonis, ke ĉiuj protestantoj en la lando estu mortigitaj. Revolucio okazis en 1540, sed estis baldaŭ ĉesigita de Karlo V., kaj de tiam Belgujo falis en la manojn de la hispanoj, okazintaj plej malfeliĉa pro la bigoteco de la hispana branĉo de la aŭstra regada familio. Karlo kaj, eĉ pli ol li, lia filo Filipo de Hispanujo provis nepre forigi la ideojn de la Reformo per pogranda mortigo.

Ĉiuj memoras pri la kruelaj okazigitaj de la fama Duko de Albo. Miloj da viktimoj mortis en grandaj suferoj, plej kruele martirigitaj. Aliaj estis malliberigitaj dum jaroj, kaj multaj miloj, inter kiuj granda nombro da lertaj metiistoj forlasis sian landon kaj rifugigis en Anglujo kaj en Germanujo. Spite ĉio, la valonaj provincoj restis fidelaj al Hispanujo, kaj eĉ helpis ĝiajn tiranojn per armeo. Dume, Holanda Princo, Vilhelmo de Oranĝo, havigis, en 1581, al la Flandraj provincoj sian sendependecon, pli malfrue ankaŭ konsentitan, sed poste reprenitan, de Hispanujo.

De 1596 ĝis 1633 la hispanaj Nederlandoj denove fariĝis aŭstraj pro la edziĝo de Izabelo, filino de Filipo kun Ĉefduko Alberto de Aŭstrujo. Je ŝia morto, ili refariĝis hispanaj, kaj poste unufojon plu aŭstraj per la *traktato de Rastadt* en 1714.

Dum la hispanaj kaj aŭstraj regadoj, Belgujo ofte estis la nevola kialo de intrigoj kaj militoj inter la Eŭropaj reĝoj kaj imperiestroj. Venkitaj de Ludoviko XI. kaj de Marlborough, dezirataj de Holando, Hispanujo,

Germanujo, Francujo, kaj Anglujo, niaj provincoj estis la sidejo de la Eŭropaj bataloj, kaj tiu periodo de la historio monda speciale havigis al Belgujo la nomon de batalkampo de Eŭropo.

De 1714 Belgujo restis aŭstra posedajo, sed okazis internaj malkonsentoj, ĝis fine la aŭstraj armeoj estis venkitaj de la belgoj apud Turnhout en 1789. Ili tiam vane petis helpon de Holando kaj Francujo; la aŭstroj reeniris Bruselon en Oktobro, 1790. Okazis tiam milito inter Aŭstrujo kaj Francujo de 1791 ĝis 1794, kun la bataloj de Jemappes, Neerwinden kaj Fleurus.

En 1793 la episkopejo de Liège, kiu de la feŭda periodo restis aŭtonoma lando sub la protektado de la germana imperio, estis aneksita al Francujo de la francaj revoluciistoj. Dum sep monatoj, de Julio 1794 ĝis Februaro 1795, la tuta lando suferegis pro la tiraneco de la invadistoj, kiuj pagigis fortajn impostojn, ŝtelis ĉion eblan kaj arestigis grandan nombron da civitanoj ĉiuklasaj. Iom post iom la situacio pliboniĝis, sed la 1an de Oktobro, 1795, la registaro de la Respubliko definitive aligis al si la malnovajn Nederlandojn (Holandon kaj Belgujon) kaj la episkopejon de Liège. Denove rekomenciĝis regno de terurismo, dum kiu ĉirkaŭ 10,000 katolikaj pastroj estis forigitaj el la lando; religiaj institucioj, la Universitato de Louvain kaj ĝenerale ĉiuj lernejoj fermitaj; artaj verkoj kaj ricaĵoj ŝtelitaj, k.t.p. Ĉio estis farita en la nomo de libereco, egaleco, frateco!

La Flandraj Kamparanoj organizis en 1798 revolucion konatan sub la nomo de Milito de la Kamparanoj, kiam centoj da tiuj vilaĝanoj, kiuj ne mortis dum la batalado, estis pafitaj sur la kampo.

La situacio tute ŝangiĝis kiam Napoleono fariĝis konsulo kaj poste imperiestro. Li remalfermis la lernejojn, repermesis la praktikadon de la katolika religio, farigis la dokojn de Antverpeno kaj starigis fortikaĵojn. Al li ni ŝuldas la unuecon de niaj leĝoj kaj administrado; la revivigon de niaj artoj kaj scienco, la floradon de nia komerco kaj industrio kaj fine remalfermon liberan de niaj havenoj katenigitaj dum centoj da jaroj.

Spite de la profitoj, kiujn li havigis al la belgoj, ili kun plezuro vidis la finon de lia regado (20an de Aprilo, 1814), kiun ili komencis malŝategi pro la enkonduko de la deviga milit-servado, la malpermeso komerci kun Anglujo kaj la persekutado kontraŭ ĉiuj religiuloj kaj precipite kontraŭ la Papo, Pio VII.

La 21an de Junio de la sama jaro, ĉe la Kunveno de Londono, estis decidite, ke Belgujo kaj

Holando formos unu landon sub la estrado de Vilhelmo, Princo de Orange-Nassau. La malvenko de Napoleono ĉe Waterloo la 18an de Junio, 1815, fortigis tiun decidon.

Je vidpunkto pure materia, la unuiĝo de la du landoj estis plej feliĉa: Holando havis fortan ŝiparon kun popolo de maristoj; posedis riĉajn koloniajn kaj komercajn interrilatojn tre malnovajn ĉie en la mondo. Belgujo posedis fruktodonajn teraĵojn, minejojn karbajn, metalajn kaj ŝtonajn kun popolo lerta je ĉiuspecaj laboroj kaj industrioj. La reĝo ĉiel helpis kaj protektis la industrian, komercon kaj artojn, sed bedaŭrinde, rilate la politikon kaj religion, Vilhelmo ne komprenis la veran rolon sian. De la komenco de sia regado, li faris gravajn erarojn kaj inter la ĉefaj estis: elektado de sama nombro da reprezentantoj en la Parlamentejo por la Hollandanoj (2,000,000) kaj la belgoj (4,000,000), subtenado de la protestantoj kontraŭ la katolikoj, malpermeso uzi la francan lingvon en la ĵugejoj, donado de ŝtataj oficoj en Belgujo al Hollandanoj, forigo el la sudaj provincoj de pastroj kaj religiuloj-instruistoj, k.t.p., k.t.p.

Post kelkaj jaroj da silenta akcepto de tiu partia estrado, la belgaj ŝtatistoj, katolikaj kaj ne-katolikaj unuiĝis kontraŭ la registaro. Miloj da personoj ĉiuklasaj subskribis plendan leteron adresitan al la Parlamento por peti egalecon por ĉiuj enlogantoj de la Nederlandoj. Al tiu nacia peto la registaro respondis per insultoj, kiuj kolerigis la popolon kaj naskigis la revolucion movadon, kiu fine eksplodis en 1830.

Jen kelkavorte kiel fariĝis sendependa Belgujo:

Čiujare la reĝa festo okazis la 24an de Aŭgusto kaj ĉi tiun jaron oni volis ĝin festi pli brile ol iam antaŭe. La popolo tamen ne volis plu resti kontenta nur per festoj. Ili surgluis la afišojn—programojn per la vortoj: 23 feu d'artifice (fajra verko), 24 illuminations, 25 révolution.

Tiun vesperon, la 25an, estis ludita en Bruselo ĉe teatro de la "Monnaie," "La Muette de Portici," de Auber (La Mutulino de Portici), opero ofte antaŭe malpermesita de la registaro pro timo de malagrablaĵoj. La loko estis plenega, kaj ĉiu revoluciema kanto tre aplaŭditā. Kiam la artistoj estis kantintaj la "dueton":—

"Amour sacré de la patrie,"
"Rends nous l'audace et la fierté"

(Sankta amo de l' patrujo, al ni redonu kuraĝon kaj fierecon), la ĉeestantoj forlasis la teatron

je la krio "Liberté! Liberté!" (Libereco). La popolo amasiĝis sur la publika placo, barikadoj estis konstruitaj, la civitanoj sin armis, kaj post unu monata batalo la Holandoj estis forigitaj el la urbo dank' al la kuraĝa sintenado de la belgaj volontuloj.

La 26an de Septembro provizora registro estis starigita en Bruselo, kaj la 4an de Oktobro ĝi decidis, ke de nun la provincoj perforte forlasintaj Holandon formos sendependan ŝaton, sub la malnova nomo "Belgujo."

Tiu sendependeco estis konfirmita per protokolo datumita en Londono la 20an de Decembro, 1830, kaj subskribita de la reprezentantoj de la kvin grandaj potenco, Anglujo, Aŭstrujo, Francujo, Prusujo kaj Rusujo. Tamen nur la 19an de Aprilo, 1839, ĝi estis definitive konsentita.

La trono de la nova ŝtato estis unue proponita al la Duko de Nemours, dua filo de Ludoviko Filipo de Francujo, kiu ĝin rifuzis. poste, laŭ la rekomendo de la angloj, ĝi estis proponita al Leopoldo de Saxe-Coburg-Gotha (onklo de Regino Victoria de Granda Britujo), kiu la 21an de Julio, 1831, ĝin akceptis, kaj regis sub la nomo de Leopold I. dum 34 jaroj.

Dum lia regado la provincoj niaj fariĝis nepre patriota unueca ŝtato. Niaj urboj beligitaj, rekonstruitaj kaj sanigitaj ĝuis prosperocon, kiu antaŭe neniam konis dum ili estis sub la estrado de fremdaj nacioj. Novaj vojoj, kanaloj kaj la fervojoj unuigis la tutan landon, eĉ la plej malgravajn kaj malproximajn vilaĝojn. Ĉiuj en Belgujo estis feliĉaj, liberaj kaj prosperaj dank' al la saĝa regado de ilia unua reĝo, kiu ne nur akceptis la konstitucion, kiel starigitan de la provizora registro, sed devigis ĉiujn ĝin obei kaj respekti.

Je la morto de Leopold I., in 1865, lia filo Leopoldo II. fariĝis nia reĝo, kaj solene promesis labori kiel lia patro je la bono de sia popolo. Li estis fidela je lia vorto. En multaj rilatoj li plibonigis la staton de sia ŝtato, havigis al sia patrujo novajn *vendejojn* por ĝiaj ĉiam kreskantaj komercoj kaj industrioj, kreis aligojn utilajn kaj dotis ĝin per riĉa kaj profitodona kolonio "Kongolando."

Lia heredonta nevo, Alberto I., sufiĉe montris pri kio li estas kapabla dum la kelkaj jaroj de sia regado, por ke mi ne lin priparolu. Mi nur esperas, ke tre baldaŭ li povos triumfe reeniri la ĉefurbon de sia detruita lando por tie prezidi la rekonstruadon kaj la prosperigon de la malgranda, fiera kaj neniam venkebla Belgujo.

PAUL BLAISE.

Veto.

De G. MAUREVERT.

Esperantigis JOHANN SCHRÖDER, Wien.

"Ne, sinjoro, mi plu neniam vetos. Jam la 13an de Junio en la jaro 1885 mi solene promesis, ke mi plu neniam vetos, kaj ĉi tiun promeson mi obeatis nun jam de dudek kvin jaroj. Ho, kiel teruraj rememoroj ligas por mi kun tiu dato! Kiun teruregan dramon mi travivis, sekve de stultega veto!

Kompatinda Jim Osborne! Se mi tion estus antaŭsciinta! Sed ankaŭ li estis kulpa je tio. Li volis fari ĝin eĉ pli bone ol Froggy. Tiu Froggy estis mi. Li nomis min tiel, ĉar mi estas franco, "ranmanĝulo," kiel oni diras en Britujo.

Eĉ hodiaŭ mi ekfebras, rememorante la aferon de mia monsranko. Mi ĝin rakontos al vi, ke vi komprenu, kial mi ĵuris, neniam plu veti.

Tiutempe mi estis malgrava komizo ĉe S-ro Brown, advokato en Croydon, urbo en la London'a distrikto. Mia patro, de tiam mortinta, tiutempe unu el la plej eminentaj notarioj en Rouen, sendis min al sia de multe da jaroj amiko Brown, ke ni ĉe li lernu la Anglan juron. Miaj kolegoj, Jim Osborne, Climber, Holloway kaj McGowan, estis bonaj kamaradoj, sed tre akre "jingo," kio tiutempe estis laŭmoda en Britujo.

Dum tiu posttagmezo, la 13an de Junio en la jaro 1885, S-ro Brown forvojaĝis al amiko Cashalton'on, por anonci al li la estontan edzinigon de sia filino Jessie kun Jim Osborne, lia ĉefa oficisto, kaj por peti lin, esti atestanto de tiu ĉi geedzigo.

Post la negocotempo, je la 4a posttagmeze, ni iris en la oficejon de Jim Osborne, por interamuziĝi tie ĉe teo. La interparolo tuŝis ankaŭ vidindajon en "Music-Hall," kiu vive interesis min: Hindo, kiu restis dum sep minutoj sub akvo en bankuvo.

"Tio estas vere miregiga," mi diris. "Kio min koncernas, mi maksimume unu kaj duonon da minutoj povus elteni sub akvo."

"Kio, Froggy," Osborne malestime inter-demandis, "eĉ vi dum unu kaj duono minutoj restus sub akvo? Eble en Francujo, sed en Britujo ne. Mi vetas kontraŭ vi, ke vi eĉ ne povas resti en tiu ĉi monsranko dum tri minutoj."

Kun tiuj vortoj li ekstaris, malfermis trankvilasange la grandegan monsrankon, kiu staris en angulo, kaj invitis min per ĝentila man-gesto, eniri. La kolegoj estis skuataj de ridoj.

La malsupra parto de l'șranko estis senenhava, kaj viro komode povis sidi kun klinita kapo.

"Bone, Osborne, kiom estu la vetajo?" mi kriis.

"Unu funto, mia knabeto!"

Rapide mi malgrandigis min kiel eble plej kaj rampis en la feran arestejon. La multpeza pordo fermfalis post mi, kaj terura mallumo kiel en tombo ćirkaŭis min. Apenaŭ mi iom povis moveti la kapon kaj la manojn. Nur la tikadon de mia horloĝo mi aŭdis, krom ĝi nenian, eĉ etan, brueton. La tri minutoj sajnis al mi eterno.

Fine mi aŭdis, ke la šlosilo estas turnata. La pordo malfermigis, kaj kun ĝojo mi forlasis la malluman șrankon.

"Vi gajnis, Edmundo," diris Osborne. "Jen, via funto, mia knabeto."

"Nu, ĝi bone estas laborenspezita," mi diris, "ĉar oni tie akiras ioman antaŭgoston de la infero."

"Sed ne; ĉar vi ĝin faris, ĝi estas tute facile farebla," mokis Osborne.

"Jes, ĝi ŝajnas facile farebla, se oni mem ne faris ĝin," mi rediris, iom incite.

"Do, mi vetas por tiu funto, kiun vi ĵus forgajnis de mi, ke mi dum ses minutoj restos tie interne."

"Se ĝi estas plezuro por vi, fari tion!"

Ne dirante unu pluan vorton, Osborne detiras sian jaketon kaj rampas en la monșrankon. Unu minuto, du minutoj pasas. Mi pasigas la tempon, priskribante al miaj kolegoj la travivitajn impresojn. Tri, kvar, kvin minutoj! Nun restas jam nur dudek sekundoj, nun dek, jen kvin... Osborne gajnis! Holloway ekstaras por malŝlosi la pordon. Subite li sin returnas kaj diras per tremanta voĉo:

"Kie do estas la šlosilo? Ĝi ja ne estas en ŝovita."

Konsternite ni ĉion traserĉas en la tuta oficejo—nenio, nenio. Angoroŝvito eligas sur niaj fruntoj kaj teruriĝinte ni reciproke fikse rigardas niajn vizaĝojn. Ni estas palaj kiel fantomoj, kaj ĉiuj kvar ni samtempe ekkrias pro teruro:

"Li havas ĉe si la šlosilon."

Kaj jen, ni jam aŭdas el la șranko fortan frapadon. Osborne frapas la pordon de sia arestejo. Nun mi krias: "Sed ekzistas ja dua šlosilo."

Tiam Holloway diris: "Jes, ekzistas tia, sed ĝi estas en la poŝo de S-ro Brown. Kaj la ĉefo revenos ne pli frue ol je la sesa."

McGowan kuris, kiom li povis kuri, al seruristo.

Tiu venis kun sia ilaro. Oni klarigis al li la

teruran akcidenton. Li ćirkaŭrigardas la feran șrankon kaj dubante skuas la kapon.

"Sinjoroj, ne ekzistas malfermilo por tiu ĉi speco de șrankoj. Estas neeble, malfermi la pordon. Oni devas iri al la fabrikisto.

"Sed tiu estas en Londono. S-ro Cremmer en Cheapside."

Dum tio la frapoj plifortiĝis kun la plej grandaj akreco kaj malpacienco. Fine ili iĝis vere malesperaj. Al mi sajnis, kvazaŭ ili trafus mian koron. Holloway, sterniĝinte sur seĝo, balbutas kun larmoj:

"Ni devas atendi, ĝis S-ro Brown revenos, kaj tio daŭros ankoraŭ pli ol unu horon..."

Dum tuta mia vivo mi rememoras tiun teruran gardadon, kiun mi daŭrigis apud la șranko, atendant la revenon de la ĉefo. Mi ne prisribos al vi lian alvenon kaj tiun de lia filino Jessie, ilian ĝemindan teruron, la malfermadon de la șranko kaj la aspekton de la korpo de senanimigo, kiu kuŝis kun fingroj krampitaj en la karnon, kun vizaĝo kovrita de sango, kun okuloj elŝveligitaj kaj kun blankaj haroj en la kavaĵo iĝinta tombo!

"Kaj nun, sinjoro, vi certe komprenos, kial jam nura penso pri veto pelas min en staton de akra furiozo!"

* * * *

Esperanto in England Twenty Years Ago.

The following extracts from a long article on "Dr. Esperanto's International Tongue" will doubtless be of interest and amusement to our readers. The article was the second of a series on International Languages, which appeared in a monthly periodical called *Languages*, under date May 15, 1894. The extracts from the translated "Preface" are, of course, from the *Unua Libro* (see *Fundamenta Krestomatio*, pp. 241—253). They are a good example of "English as she is written" by foreigners:—

"The Esperanto universal language, which was born at Warsaw in the year of grace 1888,* and did not long survive the event, was an outcome of the ephemeral success which attended its predecessor Volapük, and, like that defunct ecumenic tongue, it boasted of a superficial attraction and betrayed the fact that considerable pains and ingenuity had been expended upon its construction. Esperanto's idiom can be described as an agglutinative language. Its visible peculiarity, as will later be seen, consisted of the suffixes which were separated from the

[* This is the date of the "Opuscule," *D-ro Esperanto, Internat. Tongue, Preface and Complete Method, edited for Englishmen by J. St., 1888, Varsovio, Imp. Keltar.*—The original work appeared in 1887.—ED., B.E.]

chief portion of the word by commas. This feature naturally did not enhance the appearance of the written language.

Dr. Esperanto, who took for his motto the rather meaningless phrase: "For making a tongue international it is not enough to call it so," caused an "English" edition of the treatise explaining his invention to be prepared by one "J. St." This gentleman did well to refrain from printing his full name. His "English" is truly canine. It is, however, not for us to interfere with it. We shall give it to the reader in all its pristine beauty, and let it tell its own tale. In this manner therefore did Dr. Esperanto, through the invaluable medium of "J. St.," expound his International language to Britons:—

PREFACE.

"The reader will undoubtedly take with mistrust that opuscule in hand, supposing, that I am speaking about an unrealizable utopy; therefore I must before all pray the reader to leave off prejudice, and treat seriously and critically the question I bring forth.

"I will not speak here much about the considerable importance for humanity of one international, *by every one without any condition accepted* tongue, which, being the common property of the whole world, at the same time were no one's special property. How much time and work is spent for learning foreign tongues and nevertheless, if travelling in foreign countries, we are generally unable to speak with other human creatures in their own tongue. How much time, work and money wasted for translating literary products of one nation into an otherone's tongue, and nevertheless, by translations we can be acquainted but with a very little part of outlandish litterature. Were there an international tongue, all translations would be made exclusively in that one, as a tongue known by everybody, and works of an international character would be written originally in that tongue. The chinese wall, dividing litteratures, would disappear and works of other nations would be to us as understandable as our own. Books, being the same for every body, education, ideals, convictions, aims would be the same too—and all nations would be united in one large family. Being compelled to devote our time to the study of several tongues we cannot study well enough either of them and even there are but few persons, who can boast with the complete knowledge of their own; on the other side tongues cannot progress towards perfection and we are often obliged to borrow in speaking even our own tongue words and turns from foreigners, or to express our thoughts unexactly.

"The difference of the tongue is a cause of antipathy, nay hatred among folks, as being the first thing striking to our comprehension: not being understood we set apart, and the first notion occurring to our mind is not to know, whether they are of our own political opinion, or whence their ancestors were coming forth many a thousand years ago, but to feel the strange sound of their idiom.

"What immense importance could acquire an international tongue in science, trade, etc.—I suppose, I do not want to speak about.

"I will not try to analize here the attempts made for giving to the public an international tongue; I will only remark, that these attempts amounted or to a new system of signs for a short selfmade unter-

standing, or to a natural simplification of the grammar with a change of the words, existing in the living tongues into arbitrarily fabricated ones. The attempts of the first cathegory were quickly understood as too complicate for being practical and so vanished away; the attempts of the second could really be entitled with the name of *tongues*, but never *international* ones.

"As those essays were naively reckoned to be enthusiastically welcomed and sanctioned by the whole world, and as precisely this unanimity is impossible with the natural indifference of individuals for cabinet essays, which are not realizing direct benefits—no wonder, if they made utterly fiasco. A considerable part of the world was not at all taken up by the prospect of a new tongue, and the persons interested with it, did not mean it worth learning a tongue understood by none but the author.

"But the number of enthusiasts after having risen to a certain quantum will stop and the indifferent and cold world shall never agree with the idea of taking pains in order to speak with a few, and so again, this attempt, like others, will vanish away without being of any use.

"(Save the three principal problems mentioned, there were, as of course, still many others to resolve, but those, as being only secondary, I am not to speak of here. Before I am going on further explanations, on the way I resolved the problems mentioned, I must beg the reader to consider for a while the meaning of these problems and not trifle with these my ways of solving them, only and solely because they will appear perhaps too simple. I beg for doing this, because I know, that the greatest part of men are inclined to bestow their consideration upon a thing the more it is enigmatical, broad and indigestive. Such people, at the sight of so short a method with simple, for every one accessible rules, may be ready to look on it with contempt, whilst the aiming to shortness and simplicity, the managing of each thing in bringing it out of its complicate former turn to the most simple and easiest—was the most difficult part of my task.)"

"Thanks to these rules and other peculiarities of the tongue, about which I will not speak much here, the tongue is made very easy and the whole labor in learning it relies upon the getting by heart about 900 words (all grammatical terminations, pre- and suffixes including), out of which with settled rules every one is set—without any extraordinary ability and great application of the mind—in possibility of forming all the words, expressions and turns, necessary for quotidian life. (Even those 900 words, as it will be seen hereafter, are so chosen, that the learning of them is of no difficulty for a man of some education). The learning of this harmonious, rich and for the whole world comprehensible tongue (to be looked below why) requires therefore not a whole set of years, several days will do." *



FROM AMERIKAN SAMIDEANOJ.

"We are much pleased to see the fine and interesting numbers of THE BRITISH ESPERANTIST continuing to appear regularly. We certainly hope that they will not cease even for one number."

The American Esperantist Co. (Inc.),
West Newton, Mass.

12. I. 15.

* "One can be easily persuaded of this truth, as there is a complete method added to the opuscule."

Libraro kaj Gazetero.

Gazetoj Ricevitaj.—*Esperanto*, oficiala organo de U.E.A., Januaro 5, 1915. De nun aperas ĉiunonate ne ĉiusemajne. Jara abono: ordinara eldono, Sm. 2; luksa eldono, Sm. 2.50. La redakcio diras:

“Dum la milito *Esperanto* estis devigita interrompi sian aperadon. La malplimultigo de la oficistoj ĉe la sidejo de U.E.A., la malfacilaj postrilatoj kun la militantaj landoj, precipe en la komenco, la mobilizo en nia lando, kaj ekonomiaj kaŭzoj facile kompreneblaj, trudis tiun decidon. Ni nun decidis ĝin reaperigi, sed ĝis plibonigo de la situacio ni eldonos nur unu kajeron monate. La nombro de la pagoj dependos de la cirkonstancoj. Ni esperas, ke la abonantoj restos al ni fidelaj kaj per tio permesos al ni baldaŭ eldoni la gazeton en ĝia kutima formo kaj amplekso. De ilia helpado dependas la ekzisto de nia organo dum tiu malfacila periodo.”

Bulteno de la Junula Stelo Klubo.—4-paĝa hekto-grafita gazeteto ĉiunonata; redakcio, 2.9, Strato de l' Ecusserie, Saint Omer (Pas de Calais), Franclando; prezo, 0.60 Sm.

Ondo de Esperanto, el Rusujo. Inter la artikoloj troviĝas la interesega “Mia Reveno el Parizo” de nia bulgara samideano, Iv. H. Krestenof; “Nia Enketo, kiel oni fariĝas Esperantisto,” jen kelkaj elcerpaĵoj; “Plej bona rimedo por disvastigo de E. estas senpaga dissendo de malkaraj lernolibroj. Pri tio oni devas anonci en ne-esperantaj gazetoj”; “Tre volonte akceptas E-ton la junularo. Estas dezirinde sendi esperantajojn al ĉiuj mezgradaj lernejoj, adresante la sendajojn al ‘la plej supera klaso’”; “Laŭ mia opinio, la antaŭparolo de *La Unua Libro* devas esti tradukita ĉiulingven, presita grandlitere sur grandaj folioj kaj elpendigita, kie oni povas elpendigi, ĉar ĉiuj frazo en ĝi estas tiel konvinkanta kaj nedisputebla, kaj ĉiu, kiu ĝin tralegos atente kaj pripensante, nepre fariĝos Esperantisto.”

Nederlanda Katoliko (Januaro) en la holanda kaj esperanta lingvoj; enhavis pensigan artikolon, “Internaciismo Kultura kaj Sektana,” de Prof. Dombrowski, el Kovno.

La Voĉo de la Popolo (ĉiusemajne) el Hinujo.

La Holanda Pioniro (Januaro).

La Japana Esperantisto.

Esperanto Monthly (Jan. 15).—Beginners' number.

La Revuo.—Por fini la jarkolekton 1913-14 la numero de Aŭgusto ankoraŭ restas nepublikigita; oni eldonos ĝin tuj kiam eble. Post tiu numero la gazeto ĉesos aperi.



“The British Esperantist.”

Vol. X. (1914) of THE BRITISH ESPERANTIST may now be obtained, neatly bound in green cloth, price 4s. 3d., post free.

Cloth covers for binding Vol. X. (green cloth, lettered in white along back) are now ready. Price 1s., post free.

Vols. III. (2s. 6d., post free), IV., V., VI., VII., VIII. and IX. (4s., post free), bound in cloth, are still obtainable.



“The Esperanto Monthly.”

Vol. II., bound in brown cloth; 192 pp. Price 2s. 3d., post free.

Cloth covers for binding Vol. II., price 1s. 1½d., post free.

Respondoj al Korespondantoj.

Pli kaj Plu (daŭr.).—Rilate al respondo en la antaŭa numero, S-ro Wm. Harvey el Edinburgo skribas: “En preskaŭ ĉiu Esperanta gazeto, kaj en multaj libroj, kiujn mi legas, mi rimarkas, ke aŭtoroj, eĉ nun, ne sufiĉe priatentas unu el la *Lingvaj Respondoj* de nia Majstro.

“Ne komprende kial kelkaj aŭtoroj kutime uzis formojn de la verbo *daŭri*, kaj kelkaj aliaj de *daŭrigi*, antaŭ la infinitivo—ekz., ‘Mi daŭris (aŭ daŭrigis) labori’—mi eltiris el la Majstro Lingvan Respondon, N-ro 49, kiu aperis en Oficiala Gazeto de 25 Marto, 1911. Li klarigis, ke ĉar *daŭri* signifas ‘esti plue—ne esti finita,’ oni ne povas diri ‘Mi daŭras labori,’ sed povas diri ‘La laboro daŭras.’ (Efektive, estas la ‘laboro’ kaj ne ‘mi’ kiu daŭras). Ankaŭ ne estas bona diri ‘Mi daŭrigas labori’ (mi igas esti plue labori); oni devas diri ‘Mi daŭrigas mian laboron,’ aŭ ‘Mi laboras plue.’ Mallonge, ne uzu iun tempoformon de *daŭri* aŭ *daŭrigi* antaŭ la infinitivo.

“Mi atentigis la bedaŭratan C. Bourlet pri tre notinda malatento al tiu konsilo, kiu okazis en ‘La Revuo,’ kaj li tuj karakterize respondis ‘Mi pekis; mi pentos!’ En la Januara numero de B.E. oni legas ‘Li daŭrigas ami siajn samlingvanojn,’ strange diri, tuj post citado de parto de la Respondo supre prialudita.

“Ni soldatoj de la glora armeo Esperantista bone atentu la vortojn de nia komandanto, kiu, kvankam li ne volas ordoni, ĉiam donas bonan konsilon.”

Aparte, Precipe and Speciale.—These words by no means coincide, although possibly their meanings somewhat overlap one with the other, and each may, on occasion, be rendered by “specially.” A comparison of the following quotations will show, as their etymology also suggests, that the central meaning of *apart* is “separation”; of *precip*, “chiefly, above all, foremost, more than all other”; while *special* suggests exclusiveness, a difference of kind or class. F.K., 19, 23: “Por ĉiu horo de la tago li havis *apartan surtuton*” (a different, special, separate coat for each hour); Ham., 25, 27: “Vi mem *apartan* afablecon al li *montradis*”; Ham., 134, 8: “Pro du *apartaj kaŭzoj*”; Genezo xiii., 14: “Lot *apartigis* de li”; Ekz., 34, 14: “Grandaj brutaroj, *precipe* aroj da bellanaj ŝafoj”; Ham., 66, 8: “Unu parolon en tiu ĉi peco mi *precipe amis*”; F.K., 75, 18: “Tre mirigitaj, *precipe* la instruitulo”; F.K., 91, 12: “*Precipe* ni turnis lian atenton sur tion...”; Ekz., 19, 7: “Mi alportis argentan vazon *speciale* por tio” (not chiefly, but solely); Ham., 130, 26: “Vi povas porti vian rutoron kun ia *speciala signo*”; F.K., 241, 27: “Lingvo...apartenante *speciale* al neni” (exclusively); F.K., 305, 24: “Gi postulas de unu flanko *specialan* talenton kaj inspiron.”—A.E.W.

Kontraŭ.—Zamenhof uses this preposition not only in the sense of “against” or “in opposition to” (as in *batali kontraŭ iu*; *malamo kontraŭ iu*, k.t.p.), but also, following the usage of the German language, in the sense of “towards,” as in F.K., 38, 7: “Eltiras siajn blankajn manojn *kontraŭ la ŝipo*”; in Ham., 60, 11: “Estu sinceraj *kontraŭ mi*”; in Georgo Dandin, 19, 25: “Vi estas tro bona *kontraŭ mi*.” But I doubt whether he would describe the persons referred to in these instances as *kontraŭuloj*, and I conclude that *kontraŭ* is here presented in a somewhat strained sense, not in its central meaning. I should have no hesitation, in such cases, in using another preposition, usually *al*, sometimes *por*, or the expression (which is in effect a compound preposition) *en la direkto de*.—A.E.W.

The Esperanto Red Cross Ambulance.


As promised in our last number, we now give our readers an illustration* of the Motor Ambulance which we have just purchased and handed to the Belgian Red Cross Society. The car will leave for the Front on February 1, under the charge of our Secretary, Mr. Harold Clegg, who has volunteered to drive it, and will send us reports as to its doings from time to time. We are sure that all our readers and subscribers to the Fund will greatly appreciate Mr. Clegg's action, and heartily wish him a safe return.

* Propaganda Red Cross post cards showing the ambulance can be had at 6d. for 25, post free.

On page 25 we print a letter of thanks from the Belgian Red Cross Committee in London, to whom the car was formally handed over by Dr. John Pollen, C.I.E., at the Savoy Hotel.

Our Red Cross Fund to date amounts to £595, which means that, with a further £200 in hand, we shall be able to send out the Ambulance "Esperanto No. 2."

Will you show your sympathy with our object by forwarding a donation at once? If every member will add a few shillings to his or her membership subscription, now due, the total will be easily reached. Let Esperanto again show that it can take a useful (and merciful) part in the great conflict.



ESPERANTO RED CROSS FUND.

SECOND LIST.

Amount bought forward £439 8 3

DONATIONS (Personal).

A. MacRae, Edinburgh.....	0 5 0
A. D. Duke, Falkirk	0 5 0
Norman A. Collier, London, W.....	0 5 0
H. F. Arni, Guildford	0 2 6
Miss L. S. Grant, London, N.....	0 5 0
Madame Sujadinoff, Great Malvern	0 10 0
H. A. Towers, Nottingham	0 5 0
C. Fairman, London, S.E.	1 0 0
C. A. Fairman, London, S.E.	2 0 0
D. R. Stephen, Leigh, Lancs.....	10 0 0
T. R. Mudie, London, W.	2 0 0
S. Winkler, London, E.	0 2 6
Henry White, Bournemouth	0 10 0

Miss E. G. Martin and Miss Newbery, Eastbourne	£0 5 0
The Misses Wackrill, Leamington Spa.....	0 5 0
Capt. A. B. Colvill, Southsea	0 12 6
E. Whitley, M.A., Oxford	1 1 0
J. T. Haxton, St. Andrew's	1 0 0
Miss F. L. Wickelgren, Buckhurst Hill.....	0 10 0
A. Bunce, Surbiton	0 10 0
Miss J. Wynter, London, N.	0 10 0
Miss Annie Dent, Rotherham	0 5 0
W. Alcorn, London, S.E.	0 1 0
Rev. W. H. Harris, Ystradgynlais	0 5 0
Fred Gibson, Todmorden	0 6 0
Thomas Laycock, Leeds.....	0 3 6
Miss M. Thorpe, Harrogate	0 2 0
D. H. Lambert, London, S.E.	0 5 0
Mrs. L. de L. Helliwell, Toronto	5 1 5

Rev. T. N. Robert, Wellington, Som.	£0 5 0	Sheffield Esperanto Association (2nd)	£2 16 6
Niemann Smith, London, S.E.	0 10 0	(G. W. Roome, £1 1s. ; G. Jowett, 5/- ;	
Miss Gertrude Smith, London, S.E.	0 5 0	R. Harward, 7/6 ; Mr. and Mrs. War-	
„ Constance Smith, London, S.E.	0 2 6	render, 10/- ; P. Dunbar, 5/- ; Sundries,	
Francis Raftner, Glasgow	0 2 6	per J. Merchant, 8/-).	
R. W. Hall, London	0 2 6	Coventry Esperanto Group	0 12 0
Sydney Nicholl, London, N.E.	0 5 0	(Sundries, per Miss C. O. Taylor, Miss	
Miss Jenny Fielding, Huddersfield	0 10 0	Rainbow, and S. C. Aylward).	
James Wayman, Cottenham, Cambs	1 0 0	Perth Esperanto Group (2nd) (per J. A.	
Miss F. E. Cobb, Reading	0 5 0	Cowie)	0 4 0
Miss M. S. Yuile, Glasgow	0 5 0	Leith Esperanto Society	1 10 2
Miss M. L. Blake, London, N.W.	1 0 0	(Sundries, per Miss Donaldson, Miss	
G. R. Martin, London, S.W.	0 1 0	Dickinson, and L. W. Wallace).	
Mrs. Collyer, Chorley	1 0 0	Emmanuel Esperanto Club (2nd) (per E. A.	
Miss D. Roche, London (2nd)	0 2 0	Allsop)	0 2 6
E. A. E. Skeats, San Diego	0 1 0	Leeds Esperanto Society (2nd) (per Miss L.	
Dr. F. W. Alexander, London, S.E.	0 5 0	Briggs)	0 4 0
W. H. Webber, London, W.C.	0 10 0	Bexhill Esperanto Group (2nd) (per Mrs.	
Mr. and Mrs. E. A. Millidge, London, S.E.	1 0 0	N. F. Smith)	0 14 0
„ K. London, S.E.	0 2 0	Brighton and Hove Esperanto Group (2nd)	
John Riley, Ledbury	1 0 0	(per Miss E. M. Eklund)	0 2 2
Miss N. E. Powers, Windsor	0 2 6	Norwich Esperanto Group (2nd) (per Miss	
Mrs. R. Langley, Buxton	0 2 6	A. Egmore)	2 0 0
E. J. Williams, Inverness	0 10 6	Do. (3rd) (per Geo. Dennis)	0 10 0
Robert Lusk, Maybole	1 0 0	Bradford Esperanto Society (3rd and 4th)	
Miss A. Hamel, Nottingham (2nd)	0 5 0	(per J. T. Holmes)	6 0 0
The Misses Bone, Montreal	1 0 0	Southport Esperanto Group (per M. A.	
„ Louise „	0 5 0	Pierpoint)	9 3 6
L. H. Leadley, York	1 0 0	Scottish League of Catholic Esperantists	
Miss G. Worthington, Leek	0 2 0	(per A. T. Whitehead)	0 10 0
„ A. Healey, Morecambe	0 5 0	Edinburgh Esperanto Society (per A. T.	
Peter Gray, Lilliesleaf	0 5 0	Whitehead)	8 10 0
J. L. Radcliffe, Usk	0 10 0	Do. (Proceeds of Whist Drive organised by	
E. B. Gibson, Hebden Bridge	0 1 0	Mr. and Mrs. Senior)	3 10 0
W. B. Currie, Burnley	0 2 6	Bath Esperanto Society (2nd) (per E. R.	
Miss M. Doughty, Middlesbrough	0 5 0	Blackett)	0 2 6
L. Bracci, Fano, Italy	1 0 0	Montrose Esperanto Society (per J. D.	
W. P. Merrick, Shepperton	1 0 0	Simpson)	2 4 0
Mrs. Egerton, Knottingley	0 10 0	Manchester Esperanto Society (per J. S.	
George W. Campbell, London, S.E.	2 0 0	Lord)	3 0 0
Mrs. S. E. Wright, Newcastle-on-Tyne	0 10 6	St. Helen's Esperanto Society	
Dr. John Pollen, London, S.E.	10 0 0	(Sundries per Miss F. Davies and L.	
H. Tomlinson, Stoke-on-Trent	0 4 6	Challener).	
Chief Inspector E. Taylor, Eastbourne	0 3 6	Huddersfield Esperanto Society (2nd) (per	
„ H. F. „ Haddington	0 8 0	Miss Morton)	4 0 3
Esperantisto 8820	1 1 0	Halifax Esperanto Group (per A. Tuke	
Buchanan, Scott & Co., Glasgow	5 5 0	Priestman)	1 0 0
W. H. Baylis, Hartlepool	0 10 0	Tufnell Esperanto Group, London (per	
W. Jolly, Oban	0 10 6	E. H. Highfield)	0 4 9
Mr. and Mrs. L. T. Jones, Suez	2 0 0	L. H. Leadley, York	0 10 0
G. F. Sanders, Dorking	0 5	C. S. Schleich, London, N.E.	0 1 0
J. Gourlay, Harrow-on-the-Hill	0 10 0	Miss E. O'Brien, London	0 2 6
S. J. Davies, Loughborough	0 2 6	Miss Modwyn Gill, Tunbridge Wells	0 3 6
COLLECTIONS.			
<i>N.B.—Subscriptions of less than 5s. are included in Sundries.</i>			
Wood Green Esperanto Group (2nd)	£1 0 6	C. H. Edmonds, London, N.	0 2 0
(W. T. Cade, £1 ; Sundries, per R. Robertson, 6d.).		A. W. Thomson, Bexley Heath	0 6 9
Eastbourne Esperanto Group (per J. P. Nix)	1 2 3	Miss E. A. Lawrence, London, W.C.	2 12 0
Keighley Esperanto Society	2 12 0	(M. J., £2 2s. ; Sundries, 10/-).	
(Mr. and Mrs. J. Rhodes, 10/- ; Miss A. Smith, 5/- ; Miss K. L. Green, 5/- ; J. Edis, 5/- ; Mr. and Mrs. F. C. Rhodes, 10/- ; Sundries, 17/-).		Miss E. C. Walker, London, S.W. (2nd)	2 9 6
Dunstable Esperanto Group (per J. Collett and R. B. Angier)	0 10 0	(Mrs. Godwin, 5/- ; Miss Conacher, 5/- ; Mr. Kippen, 5/- ; Peter Macdonald, £1 ; Misses Fitch, 7/- ; Sundries, 7/6).	
Greenock Esperanto Society	2 0 0	Dr. D. J. Davies, Aberystwith	0 5 0
(Mr. Lees, 5/- ; Sundries, per Miss M. E. Hamilton, £1 15s.)		H. Sewell, Deal	0 3 0
		Miss M. B. Clark, Weybridge	1 0 0
		(From the household, in remembrance of Dr. W. J. Clark).	
		E. K. Jayne, Charlton, S.E. (2nd)	0 12 6
		(V. Grimmitt, 5/- ; Mrs. Crisp, 5/- ; Sundries, 2/6).	
		Total	£572 3 6

The British Esperanto Association (Inc.).

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

Miss A. CONSTANCE AMBLER, 31, *Bela-grove, Blackpool*; G. R. BENSON, 6, *Bowesfield-lane, Stockton-on-Tees*; H. A. BOWERS, “*Lyndhurst*,” *Hayle-road, Maidstone*; A. V. DOUGHTY, 37, *Harris-street, Millfield, Peterborough*; Miss VERONICA ELLIS, *Chalice Well, Glastonbury*; A. GEAR EVANS, 3, *Dunraven-place, Bridgend, Glam.*; HARRY FLINT, 36, *Clifton-street, Blackbury*; JAS. T. FREEMAN, 39, *London-road, Preston, Lancs.*; H. T. GARDNER, 131, *Winston-road, Stoke Newington, N.E.*; ROGER GOODLAND, 10, *Dartmouth-street, Boston, U.S.A.*; T. F. W. HARMER, 23, *New-street, Chatham*; H. W. HAYDEN, 24, *St. Luke's-road, Queen's-park, Brighton*; Miss A. HEALEY, *Linden House, Norton-road, Morecambe*; A. JONCKHEERE, 148, *East Dulwich-grove, S.E.*; ROBERT LUSK, *Bolton, Haddington, Scotland*; Miss E. MITCHELL, *The Grove, High-street, Hailsham, Sussex*; F. A. NEWMAN, c/o *Standard Bank of Australia, Ltd., P.O. Box 1031, Johannesburg, S. Africa*; W. M. C. NOWELL, 338, *Hainton-avenue, Grimsby*; Rev. P. G. PREVOST, *Catholic Church, High-road, Ilford*; JAMES L. P. RADCLIFFE, *Treyn Bell, Usk, Mon.*; Mrs. E. ROBERTS, 8, *Oak-mount, Todmorden*; Miss FRANCES SCOTT, 69a, *Henderson-row, Edinburgh*; Mrs. C. FLETCHER SMITH, 17, *Sydenham-park, S.E.*; JOSEPH SPIES, 148, *East Dulwich-grove, S.E.*; Mrs. TERESA SUJADINOF, 3, *Lansdown-crescent, Great Malvern*; HEARLY SYKES, 1, *Somerset-crescent, Moldgreen, Huddersfield*; JOHN THOMAS, 1, *Thurland-street, Middleton Junction*; C. W. VENESS, 1, *Oak-road, Canning Town, E.*

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

NORMAN C. LEVERMORE, *Hounslow*; JACK S. WARD, *Chiswick*; GEORGE F. EUSTACE, *Chiswick*; *REGINALD J. MITCHELL, *Brentford*; SIDNEY C. HILL, *Brentford*; ARTHUR L. GOMME, *Brentford*; T. A. SCHOFIELD, *Brentford*, all scholars of the Rothschild School, Brentford, Middlesex.

NEW DELEGATE COUNCILLOR.

East London Guild.—Mr. C. S. SCHLEICH.

NEW FELLOWS.

Rev. D. J. M. BÉRENGER, O.S.B., *Badulla, Ceylon*; Miss M. W. B. PURNELL, *Melbourne, Australia*.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.

Subscriptions, 1915.

Fellows and Members are respectfully informed that subscriptions for the year 1915 became due on 1st January, 1915. Those who have not yet remitted are requested to do so as early as possible. The annual subscriptions are:—Fellows, 10s.; Members, 5s.

H. CLEGG, Secretary.

London Chamber of Commerce.

Esperanto Examinations.

The Esperanto Examinations (Junior and Senior) of the London Chamber of Commerce are to be held on Wednesday, May 19, 1915, in London, and at Local Centres in the Suburbs and in the Provinces. Group Secretaries and Teachers who desire their students to enter are requested to obtain a Syllabus from the Secretary of the B.E.A. If necessary local centres may be specially formed, particulars as to which will be supplied by the B.E.A., who will be glad to forward information to students also. The B.E.A. hopes there will be a large number of candidates for these important examinations.

Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilinia empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri penceoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

562. **Manchester (Anglujo).**—S-ro W. Bailey, 32, *Crescent-road, Cheetham-hill*, deziras interŝanĝi poštmarkojn laŭ Stanley Gibbons katalogo. Ne kolektos kartojn.

563. **East Ham (London, E.).**—S-ro A. H. Braddick, 37, *Milton-avenue*, komencanto, deziras korespondi kun pliprogresinta samideano alilandaj.

564. **Melbourne (Victoria) Australio.**—F-ino M. Schofield, 26, *Austin-st., Footscray*, deziras korespondi p.k. aŭ letere kun gesamideanoj de la tutmondo.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, January 18, 1915, at 6.30 p.m. Present: Messrs. B. Chatterton, H. A. Epstein, C. A. Fairman, G. W. Harrison Hill, R. Holder, G. Mercer Hollis, B. E. Long, A. Morrow, W. Phillimore, C. S. Schleich, F. M. Sexton, H. S. Taylor, Dr. John Pollen, Misses M. L. Blake, L. S. Grant, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, E. O'Brien. In Attendance: Messrs. E. A. Millidge, A. E. Wackrill, The Secretary.

Chairmen: Mr. Harrison Hill and Miss Lawrence.

Finance.—A draft of the Balance Sheet and Revenue Account at December 31, 1914, was read to the meeting and approved.

Red Cross Ambulance.—A letter was read from the London Committee of the Belgian Red Cross Society acknowledging the gift of a Motor Ambulance, and the letter was ordered to be printed in THE BRITISH ESPERANTIST (see p. 25). A photograph of the Ambulance was shown to the meeting, and it was decided that a photo postcard of the Ambulance should be prepared and put on sale to advertise the Fund.

Guarantee Fund.—The letter from Mr. H. T. Bailey referred from the previous meeting was considered. It was decided, however, that in regard to the Guarantee Fund for 1915 no change in the system should be made. Mr. Chatterton and the Secretary were authorised to prepare and issue a letter to the present guarantors calling up the amount due and asking for renewal of support; and also a circular for insertion in THE BRITISH ESPERANTIST, inviting subscriptions to the Guarantee Fund for 1915.

British Esperanto Congress, 1915.—Letters were read from Mr. E. R. Blackett, of Bath, in connection with the Congress arranged to be held in that city at Whitsuntide, 1915, and the following resolution, proposed by Mr. B. E. Long and seconded by Dr. Pollen, was carried:—

“The Council, having considered the communications received from the Bath Esperanto Society, heartily supports the conclusion of that Society that the Eighth British Esperanto Congress ought to be held in Bath at Whitsuntide. The Council sincerely hopes that every Esperantist able to attend the Congress will forthwith announce to the Bath Esperanto Society his intention of being present if possible.” (See p. 25).

Council and Executive Meetings, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, February 15th, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

H. CLEGG, Secretary.

565. **Londono (Anglujo).**—S-ro N. A. Collier, 8, *Cavendish-buildings, Cavendish-square, W.*, kaj F-ino L. Collier, 78, *High-street, Putney, S.W.*, volas interŝanĝi ilustritajn poštmarkojn kun alilandaj gesamideanoj. Afiksu poštmarkojn bildflanke. Ciam respondas.

566. **Londono (Anglujo).**—S-ro J. Reeks, 39, *Grant-rd., S.W.*, deziras korespondadi kun fraŭlinoj alilandaj.

567. **Maidstone (Kent) Anglujo**—S-ro Jozefo Hale, artstudanto, 134, *Wheeler-street*, deziras korespondadi kun alilandaj studantoj pri l'arto kaj aliaj temoj.